Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista.
N° 43 (61) - Julio/Aŭgusto 1982 - Prezo : 3 FF.

ISSN 0150-5823

# laŭte!

Unujara abono : 18 FF
al la poŝtkonto n° 3 371 74 M BORDEAUX de la eldonanto :
Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT



# ree pri milito(j)...



# VORTOJ DE MALJUNULO

----
valo
----

REE PRI MILITO(J)

La homaro posedas nukleajn armilojn en kvanto sufiĉa por plurfoje sin ekstermi, kaj detrui ĉiun vivon sur la tero. Ĉiu scias tion, sed al tiu scio la homoj diverse reagas. Iuj estas indiferentaj, kvazaŭ la afero ne koncernus ilin, aŭ fatalistaj ; aliaj, timante pri la ebleco de tria mondmilito kun uzado de tiaj armiloj, estas teruritaj de tiu perspektivo ; kaj aliaj, ĝuste pro tiu terura danĝerego, estas iel trankviligitaj : ĉar ili opinias, ke neniu homo estos sufiĉe freneza por starti la apokalipson. Mi dividas nek la timegon de la unuj nek la trankvilecon de la aliaj.

En julio 1914, mi aŭdis plurfoje jenan aserton : "Se okazus milito, la potenco de la peza artilerio estas tia, ke la armita konflikto povus daŭri apenaŭ du semajnojn." Ĝi daŭris pli ol kvar jarojn ; dum tiu tuta tempo la peza artilerio ambaŭflanke tondradis, disŝutis sur la tranĉeojn diluvon da feraĵoj kaj kaŭzis milionojn da mortoj.

En 1930-38, oni diris : "en eventuala nova milito, venengasoj formus mortigajn nubtavolojn, kiuj detruus la tutan vivon en urbegoj kiel Parizo ; kaj bakterioj disvastigus amasmortigajn epidemiojn sur tutajn landojn." Venis la milito ; ĝi daŭris pli ol kvin jarojn. Neniu uzis gasojn nek bakteriojn. Sed per grandegaj eskadroj da bombaviadiloj oni detruis urbegojn kiel Dresdeno kaj Hamburgo, farante en unu sola nokto centmilojn da viktimoj. Fine Hiroŝimo kaj Nagasako : sufiĉis unu sola bombo por ĉiu el la du urboj. Neutile

- Kion vi diras ?
- Mi diras : neutile, el grandstrategia vidpunkto. Ĉar tiam, eĉ sen tio, Japanio estis preta kapitulaci.



- Do kial oni tion faris ?
- Ĉar tio estis necesa.
- Mi ne komprenas : neutila, kaj tamen necesa ? Kiel do ?
- Aŭskultu. Neutila, ĉar la milito estis tuj finiĝonta, kaj oni povis ŝpari tiujn lastajn centmilojn da mortoj. Necesa, ĉar la usonaj militistoj nepre bezonis eksperimenti sian novan ludilon en reala grando kaj en realaj cirkonstancoj ; kaj, ĉar la milito povis tuj finiĝi, la bezono fariĝis urĝa. Tial la pia prezidento Truman ordonis faligi la du bombojn ; en plena trankvilo de konscienco ; kaj li longe plu postvivis tiujn abomenajn tagojn, ŝajne sen konsciencriproĉoj.

Poste okazis aliaj militoj : Koreio, Vjetnamio. Oni ne uzis atombombojn : oni ja sciis fabriki bombojn centoble, miloble pli efikajn, kaj ne bezonis novan realan eksperimenton. Sed oni provis napalmon kaj senfoliigajn substancojn. Tiel ĉiu limigita milito utilas por akiri novajn spertojn cele al eventuala grandskala konflikto. En pli freŝdataj : Izraelio, Iran-Irakio, Malvinaj (Falkland-) insuloj, oni ne uzis nukleajn bombojn, sed oni provis ĉiam pli modernajn ĉarojn, aviadilojn kaj misilojn.

De ĉio ĉi, kion konkludi ?

Profetado estas ĉiam riska. Sed oni povus preskaŭ veti, ke :

1. Efektive neniu riskos iniciati detruon de la tutplaneda vivo. Tial mi ne estas tute pesimista.
2. Oni lasos dormi en la arsenaloj la plej efikajn amasbuĉajn rimedojn. Tio ebligos tamen fari mondmiliton iel similan al la du antaŭaj, eĉ kun pli multaj milionoj da mortoj. Sufiĉos taktikaj bombetoj kaj neŭtronbomboj. Tial mi ne estas tute optimista.

Resume : mi ne tro timas, ke tria mondmilito ekstermos la tutan homaron, sed mi timas, ke ĝi estas ebla, kun limigitaj, tamen jam teruregaj efikoj.

Bedaŭrinde, ŝajnas, ke multaj homoj ne konscias pri tiu danĝero.
Eble, tamen, ekkonscio pli kaj pli grandiĝas inter la gejunuloj ?

VALO.

## "LA SUDATLANTIKA KRIZO"

Falklandaj aŭ Malvinaj insuloj

Hieraŭ vespere aŭ eble hodiaŭ matene la radio informis, ke argentina militŝipo estis torpedita kaj eventuale pluraj centoj da maristoj mortis. Granda funebro venos en la korojn de same multaj patrinoj. Jam dum pluraj semajnoj tiu krizo donis grandajn rubrikojn al ĵurnaloj kaj nun oni atendas la klimakson. Kio okazos ?

Iomete analoga incidento venas en mian menson. Temas pri Alando, insularo inter Svedio kaj Finnlando, pri kiu oni disputis komence de la dudekaj jaroj. La insularo estas plene svedlingva kaj la aranĝita plebiscito montris, ke la loĝantaro 100-procente unuanime volas aparteni al Svedio. La disputon oni transdonis al la Ligo de Nacioj por solvo kaj ĝi decidis favore al Finnlando. Malgraŭ tio ke tiutempe en la fiksado de la ŝtatlimoj oni strebis obei la naciecan principon, surbaze de la japana propono la tiutempaj grandpotencoj Britio kaj Francio decidis laŭ la historia aparteno de Alando al Finnlando. Oni diras, ke la konata esperantisto kaj lingvisto G.J. Ramstedt, tiutempe la ambasadoro de Finnlando en Tokio, dank'al siaj esperantistoj-amikoj en la japana ministerio de eksterlandaj aferoj, fakte "verkis" tiun japanan proponon, kiun la aliaj potencoj "englutis". Nuntempe ne ekzistas ia ajn problemo tiurilata inter Svedio kaj Finnlando, Alando ĝuas vastan aŭtonomion kaj ĝiaj junuloj ne bezonas eĉ militservi.

La sudatlantika krizo estas iom pli komplika. Sur la menciitaj insuloj loĝas pli ol 1000 britaj civitanoj, kiuj nepre ne volas aparteni al Argentino, kiu estas militistdiktatura, tre mizera ekonomie pro altega inflacio kaj kie "malaperas" homoj "senspure". Pro la geografia proksimeco kaj pro "historia" kaŭzo (antaŭ 130 jaroj la insuloj apartenis al Argentino kaj antaŭ tiam al la hispana trono) Argentino postulas returne sian "teritorion". Aliflanke, kial Britio volas reteni tiel obstine la restaĵon de sia iama imperio? Ĉu la "stumpo" kaŭzas fantoman doloron ? Ĉu la nuna "kanonboata" diplomatio estas ĝusta medikamento ? La kostoj pri tia ludo estos altegaj por ambaŭ ŝtatoj, eble Argentino ekonomie kolapsos, neniu fakte el tio profitos, eventuale la militista reĝimo de Argentino finiĝos... ŝovinismo kaj imperiismo ambaŭ estas toksa veneno el nia esperantista vidpunkto. Esperanto estas bonega kontraŭveneno por ambaŭ mensaj amasmalsanoj.

Kuopio, la 4an de majo 1982 — S.P. Hurtta, Finnlando.



''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''

## PACO EN LA PROKSIMA ORIENTO PER FEDERACIO DE LA ŜTATOJ ISRAELO, JORDANIO KAJ LA FONDOTA PALESTINIO

'''''''''''''''''''''' El la hebrea E-igis Roll Löwenbein (Frankfurt)

El intervjuo de Ibrahim Samaan, prezidento de la ligo por federacio en la proksima oriento, fondita en Israelo en 1972. La nombro de la membraro estas ankoraŭ malgranda. La celo, pacigi la judojn kaj la arabojn, ŝajne nun pli realigebla ol en 1972.

Demando : kiel vi vidas la araban problemon ?

Samaan : Ĝis 1967 la Araboj akceptis neniun solvon. Ili tute ne aprobis la ekziston de Israelo. Hodiaŭ la revo nuligi la israelanojn ne plu ekzistas. En 1967, la venko de la Israelanoj kreis la bildon de la israela "superhomo". Sed la oktobra milito pruvis, ke la Araboj lernis la militan teknologion. Mi venas al la konkludo : Kiam Egiptio kaj Israelo subskribis packontrakton, tio devas esti ebla kun la aliaj arabaj ŝtatoj. Sed tio ankoraŭ ne estas la solvo de nia problemo. Antaŭ la solvo de la palestina malfacilaĵo ne estos paco. Mi ne kredas je la unueco de la Araboj. Tio estas nur parolo sen enhavo. La unueco estas nur vorto en la politika vortaro de la arabaj ŝtatoj. Mi konas nur egiptan, libanan, sirian, sudanan, irakan kaj aliajn arabajn popolojn. Ĉiu estas propra popolo. Sed en neniu estas loko por la Palestinoj. Kelkaj arabaj ŝtatoj luktis kaj ankoraŭ luktas kontraŭ Israelo. La lando, kies nomo nun estas Israelo, tamen posedis militan kaj komercan signifon. Estas ŝanĝmerkato inter Afriko, la malproksima Oriento kaj Eŭropo. Iam la jordana

reĝo revis regi ne nur super Jordanio sed ankaŭ super pli ol duono de la nuna Israelo. Tion montris la dividplano de 1947. Kiam li intencis konkeri tiun parton, li ne iris sola sed kun Irako. Tie regis lia kuzo. La hameŝida dinastio regis super ambaŭ landoj. Tamen la milita graveco de Palestinio (la tiama nomo de la regiono) transformis la landon en arenon, kie la suda ŝtato, Egiptio, kaj la norda ŝtato, Irano, konkuris. La Egiptoj ne permesis alian araban ŝtaton etendiĝi.

Dum la kvardekaj jaroj, la palestina problemo estis nur atuto en la kartludo de la arabaj landoj, de la registaro de la brita mandato kaj de la judoj. En tiu ludo, la nunaj Palestinoj estis la veraj perdintoj. Post la venko de la Israeloj, oni deklaris la "sanktan militon". Sankta milito tamen ludas gravan rolon en la historio de la araba imperio. Hasnein Hajkal iam diris en Egiptio : "Ni loĝas en grandaj urboj kaj uzas la modernan teknologion. Sed ni ne devas forgesi, ke ni restas loĝantoj de la dezerto. En niaj animoj, kiuj pensas en la kategorioj de la dezertleĝoj. Jen unu el la dezertleĝoj : Kiam vi luktas, vi devas atingi la venkon. Sed de la momento, kiam deklaris pacon al via iama malamiko, vi estas responsa pri lia defendo." Tial mi kredas, ke ni devas substreki la malsamajn mensojn. Kolizias la orienta kaj okcidenta menso, kiun kunportis la judoj en Israelon. En la komenco, la palestinoj ne estis sufiĉe fortaj por laŭtigi sian voĉon. Tamen ili petis la samon kiel hodiaŭ. La mondo aŭskultas la fortulon. Liaj argumentoj konvinkas. (Kiu scias tion pli bone ol la Judoj ?) Kvankam la juda popolo pruvis sian forton kaj fondis sian ŝtaton, la mondo aŭskultis. La samo okazis kun la Palestinoj. Kiam ili estis en rifuĝkampoj kaj ricevis almozojn de UNO, neniu atentis pri ili. Tamen, kiam ili prenis armilojn, oni atentis pri ili. Mi estas kontraŭ la forto en iu ajn formo. Bedaŭrinde, ni vivas en mondo de forto.

Ekde 1967 la situacio ŝanĝiĝis. La parolo de Ŝukri : "En la maro kun la judoj!" estas abomena. Sed tio estas la araba menso. Kiam du arabaj knaboj kverelas, oni ofte



aŭdas : "Mi mortigos vin." Neniu pensas fari tion. En Nov-Jorko tiu minaco devas esti alie komprenata. Tie oni pensas, kion oni diras. En la orienta menso tio estas nur vortludo montranta la forton de la angoro. Nasser trafe diris post la ses-taga milito : "Ni eraris en nia propagando. Ni estis tro ekstremaj." Pro tio, li forsendis sian ministron pri propagando post la milito. Nasser konfesis alian eraron : "Kiam ni menciis la judan popolon, ni pensis pri la cionista movado."

## P R I   L A   P A C O (sekvo)

Sub tiu titolo aperis stranga artikolo sub la subskribo de PETRO en la n-ro 42 de "Laŭte!". Tiu kamarado legis hazarde ekzempleron de "Le Monde libertaire" kaj malkovris, ke tiu anarkiista gazeto entenas kontraŭkomunistajn artikolojn, kaj li miras pri tio, ĉar, laŭ li, la komunistoj estas fervoraj pacamantoj, kiuj defendas la laboristaron.

Kiel malnova leganto de "Le Monde libertaire", mi ne miras pri la sisteme kontraŭkomunista sinteno de la anarkiistoj. Kial ?
Teorie la komunistoj deklaras, ke ili favoras la pacon, la liberecon, la egalecon, ktp. Sed praktike ni konstatis, ke kiam ili posedas la povon, ili aplikas siajn teoriojn laŭ tre "speciala" maniero. Mi citos nur kelkajn ekzemplojn de pacamo :
- Budapeŝto, Prago, Afganio, ktp...

de liberecemo :
- la gulago, ktp...

de defendo de la laboristaro :
- Polio, ktp.

Ankaŭ mi ne ŝatas disputon, sed ĉi tie temas pri lukto inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj.

<u>**Yves PEYRAUT**</u>.






Nia nova debato :

# memmortigo kaj eŭtanazio

En nia ĵus antaŭa debato ni pritraktis la aspektojn de la maljunaĝo en nia socio. La homo vivas, solvante problemojn. La lasta nin koncernanta afereto estas la morto. Kaj eĉ por tiu la homo ofte povas mem kontribui al ties solvado. Jam de longe regas la kutimo testamenti kaj eĉ, se iu havas motivon por tio, tiu povas mem decidi ankaŭ pri la horo de sia korpa fino (pri la cetero la opinioj diferencas) : per memmortigo.

Nur de relative pli mallonga tempo la scienco oficiale disponas pri rimedoj helpi al sendolora, aŭ almenaŭ malpli suferiga "forpasado"en la nenion - aŭ en la alian mondon. Sed ne ekzistas leĝo oficiale rajtiganta iun - ekzemple kuraciston - helpi la mortemulon per eŭtanazio. Praktike, mi scias, ke iuj kuracistoj jam faris tion (plejofte post peto de paciento, kompreneble, sed eble ankaŭ pro peto de samfamilianoj, kiam tro terura fariĝis la antaŭmorta suferado de la malsanulo). Sed ĝis nun eŭtanazio restas malpermesita kaj "kulpa" kuracisto riskas punon. Tial, pro propraj motivoj, homo povas decidi ne atendi la "naturan" morton, mem zorgante pri la afero.

Kion opinii pri tiuj du aspektoj de nenatura morto ? Ĉu ĉies rajto mem disponi pri sia korpo devas inkluzivi ankaŭ la rajton peti eŭtanazion aŭ mem zorgi pri memmortigo ? Aŭ ĉu tiaj faroj estas krimaj ?

Por mia propra korpo mi ne ekskludas la eblecon de memmortigo ; mi vidas eĉ plurajn avantaĝojn en tiu solvo. Sed tiel longe dum eŭtanazio restas oficiale malpermesita, mi ne sentas la rajton peti de iu kuracisto aŭ de samfamiliano apliki eŭtanazion al mi : eĉ se estus skriba dokumento klare senkulpiganta la helpant(in)on, mi opinias, ke tiu peto estus tamen morala trudo, kontraŭ kiu la help-

ant(in)o eble iam bedaŭrus esti nerezistinta.

Kribo.

''''''''''''''''

Se temas pri elekto rilate al tre preciza malespera situacio - nekuracebla kaj suferiganta malsano - memmortigo estas solvo, aktiva sinteno, kiun neniu rajtas kondamni aŭ juĝi.

Pri eŭtanazio decidu, agadu kaj elektu la aliaj, kiam estas pli bone por iu malsanulo morti aŭ plu vivi... Certe tio estas kontraŭleĝa, sed eĉ tia, praktike tiu situacio sin prezentas al personoj kiel terura dilemo : kia ajn estas la solvo adoptita, ĝi afliktas.

Ĉu eŭtanazio devus esti laŭleĝe akceptita ? Imagu, kiom malfacile estus por la leĝproponantoj starigi tiun leĝon: difini oficiale kiam personoj rajtas esti "mortigitaj", difini kiam la suferoj estas neelteneblaj, ktp.
Eblus decidi permeson de eŭtanazio al personoj, kiuj tion petas ĉu skribe, ĉu parole antaŭ pluraj atestantoj. Estus la plej "kontentiga" rajto. (Sed mi scias, ke personoj, kiuj antaŭe firme asertis, ke ili memmortigos sin aŭ petos eŭtanazion aŭ rifuzos medikamentojn por plilongigi sian vivon, se ili iĝos nekuraceble malsanaj, fronte al la situacio ne plu kuraĝas tion...). Male, estas kuracistoj, kiuj response sin rezignas al eŭtanazio en specialaj kazoj, kaj ĝis la morto asistas la mortiĝantojn...

Estus bone doni rajton decidi je preciza evoluo de nekuracebla malsano, ne artefare plilongigi la vivon, nur permesi mildigon de la lastaj momentoj per anesteziloj.

Se temas pri memmortigo fare de sanaj individuoj, junaj aŭ ne, estas tute alia afero.

...

Jes, ĉiu rajtas (aŭ devus rajti) mem disponi pri sia korpo, pri sia vivo. Sed ĉu vere tio eblas ? Tiukaze memmortigo aspektas kiel vivfiasko, ne nur la korpo estas trafita sed ankaŭ la konscio, la spirito. Tiam estas samtempe individua kaj socia problemo filozofia. Ofte sufiĉus iom da amika zorgemo, atento, por ke iu rezignu sin mortigi, eĉ sufiĉus kelkfoje paliativo por manko de iu fiziologia elemento...



Same kiel la naskiĝo, la morto ne estas nur individua fenomeno, sed ankaŭ socia. "Ni", la socio, responsas, por ke eblu al ĉiu "digne morti".

Sincere mi opinias, ke ne temas pri laŭleĝa afero; eĉ se leĝoj klare ekzistus por ebligi eŭtanazion, la konsciencaj problemoj plu daŭrus...

Pli plaĉus al mi diskuti pri vivfortoj !...

Nicole.

''''''''''''''''

Memmortigo kaj eŭtanazio : kvankam tiuj du agoj havas saman rezultaton (elekti la momenton, kiam finiĝos iu homa vivo), ili malsimilas en grava punkto. En la unua ago sian propran morton okazigas la persono mem, en la dua decidi por la koncernato devas alia persono : ĉu kuracisto, ĉu familiano aŭ alia... La respondeco ne estas la sama.

Memmortigo povas havi diversajn kialojn : neelteneblan situacion korpan aŭ mensan (la limo varias laŭ la individua sentokapablo), deziron elekti mem la momenton, kiam oni rezignos la surteran vivon, esti okulfrapa ekzemplo por la ceteruloj (Jan Palach, la bonzoj, k.c.).
Laŭ mi, almenaŭ kiam ĝi ne estas trudata de la socio (kiel en la karceroj aŭ aliaj subpremaj institucioj), la memmortigo estas homa rajto, individua decido.
Sed per siaj juraj aŭ religiaj konceptoj la socio konsideris kaj ankoraŭ plu konsideras memmortigon senkuraĝa sinteno, kontraŭstaro al la Dia volo, ktp. Pro tio memmortigo estas tabua temo (krom por "Laŭte!")...
Konsiderante, ke la rajto estas nenio sen la rimedoj plenumi ĝin, en pli ol dudek landoj tiel malsimilaj kiel Danio, Izraelio aŭ Zimbabua lando stariĝis "asocioj por la memmortiga rajto". En Skotlando kaj Britio oni eĉ publikigis gvidlibrojn "por la memliberigo" (angla titolo: "A guide to self-delivrance") kaj gvidilojn "Kiel morti digne" ("How to die with dignity"). Tiuj gvidiloj donas praktikajn rimedojn por "milda morto" al anoj de asocioj "Exit". Tiuj gvidiloj vekis reagon de la kutimaj kontraŭstarantoj.
En Francio, en la sama spirito ĵus aperis la libro : "Memmortigo ; uzmaniero". Franca titolo : "Suicide ; mode d'emploi" de Claude GUILLON kaj Yves LE BONNIEC (eld.

Alain Moreau). Tuj de ĝia apero okazis protesto de Asocio de Konsumantoj por malaperigi la praktikajn konsilojn el la libro (unu ĉapitron). Nun la peto estas ĉe la franca ministro pri justico kaj la libro estas praktike malaperigita el la librovendejoj. Tiu gvidlibro ne estus la unua en Francio. Jam en 1901 aperis broŝuro pri tiu temo, verkita de la liberecana edukisto Paul ROBIN, kiu mem poste sin mortigis. En tiu epoko kiel en la hodiaŭa okazis la sama polemiko inter la aprobantoj de la libera esprimo kaj tiuj de la socia kontrolo. La Mondo malrapide evoluas !

...

Pri eŭtanazio la problemo estas laŭ mi multe pli kompleksa. Estas almenaŭ mia opinio post legado de libro (vere malgaja legaĵo, sed utila se oni volas bone koni la aferon alie ol kun antaŭjuĝaj ideoj). Du famaj francaj televidaj verkistoj decidis dediĉi dissendon pri la eŭtanazia temo. Por tio ili disdonis demandaron al la aŭskultantoj. Ili ricevis plurajn milojn da respondoj (vidu la gravecon kaj la intereson pri la problemo) de personoj, kiuj praktike travivis tian afliktan sperton: kunuloj de gravaj militvunditoj, familianoj de nekuraceblaj maljunuloj, kuracistoj, flegistinoj, parencoj de invalidoj aŭ mense malsanaj infanoj, pastroj, advokatoj, ateistoj kaj religianoj. Post legado de tiuj multnombraj leteroj la televid-verkistoj, fronte al la respondeco diskonigi publikan elsendon, rezignis kaj anstataŭigis ĝin per enketo en "popola" franca gazeto "FRANCE-SOIR". Multaj personoj partoprenis, skribis leterojn, petis viziton de la enketantoj. Post tia enketo la televid-verkistoj opiniis, ke ili ne rajtas konservi nur por si tiajn dokumentojn kaj ili decidis verki libron, raportante pri tiuj kontaktoj kun personoj, kiuj praktike devis alfronti la doloran problemon de eŭtanazio. Foje tiuj personoj plenumis la agon, foje ili retroiris lastmomente, sed ofte ili eksentis kulpan sintenon en iu ajn decido. Ĉiu kazo estas unika kaj unika la respondo. Jen la konkludo de la libro : "Povas esti iu, kiu principe kondamnas eŭtanazion kaj kiu ĝin plenumos, kaj tiu, kiu ĝin aprobas teorie, sed kiu kun mirkonsternego konstatos, ke la korpo rifuzas efektivigi la ordonojn de la cerbo." Al tiu konkludo mi aldonos nenion !



Kompreneble, tiuj konsideroj validas nur por la individua eŭtanazio. La kolektiva eŭtanazio malfermas la pordon al ĉiaj misuzoj. (Vidu la naziajn amasmurdojn!).
Por la scipovantoj de la franca lingvo jen la titolo de la libro pri eŭtanazio : "Le dossier confidentiel de l'Euthanasie" de Igor BARRERE kaj Etienne LALOU. Ed.du Seuil, Collection Points.

J.G.

''''''''''''''

Kiam iu memmortigas sin, oni povas certi, ke liaj suferoj korpaj aŭ moralaj estis tro grandaj
La morto povas esti libervola dum milito aŭ por savi iun el granda danĝero. Ĉiu el ni aŭdis pri "kamikazo". Ŝajne estis libervola sinofero, sed tiukaze la malespero estis kolektiva. Ĉar granda malhonoro minacis la landon : malvenko ; kio certe povas instigi patrioton al ekstremaj rimedoj. Iom saman situacion oni trovas en laŭordona memmortigo : la persono obeas al volo pli forta ol ĝia vivdeziro.
En okcidento memmortigo estas rigardata kiel malmorala Se tiel konsiderata, la problemo estas sensolva. Pli ĝuste estas ekzameni ties kialojn personajn aŭ kolektivajn, ĉar unu el la plej gravaj konsekvencoj de la nuna vivmaniero estas plimultiĝo de suicidoj.

Pri eŭtanazio, ankoraŭ ne eblas leĝe ĝin permesi : la morala nivelo de la homo ne estas sufiĉa.
La malpermeso povas esti ankaŭ filozofia, religia, socia.
Sed objektive, ĉu iu rajtas juĝi personon, kiu laŭ peto de la suferinto ĉesigis neelteneblan martiriĝon ?
Pro tio, kromekstera interveno, mi dubas, ĉu sincera helpant(in)o iam bedaŭros sian geston.

Jean-Claude.

'''''''''''''''

Suzana sendis al la redaktejo de "Laŭte!" dokumentojn de la asocio A.D.M.D. : "Asocio por la rajto morti en digno". Ĉar tiuj dokumentoj trafe respondas la temon, kaj ĉar ili povas interesi iujn legantojn, ni volonte konsentas aperigi tiujn tekstojn tradukitajn de ŝi.

Jen unue la adreso de ADMD, al kiu sendi la poŝtaĵojn :
A.D.M.D., B.P. 322.09, F 75423 PARIS CEDEX 09.
Tel. 874 19 99.

Jen nun la teksto sugestita kiel "biologia testamento" :

> Se iun tagon mi ne plu estus kapabla decidi pri mia propra estonteco, mi petas, ke jenon oni konsideru kiel la esprimon de mia volo sufiĉe pripensita.
>
> Ekde kiam miaj mensaj aŭ fizikaj kapabloj malaperos, kaj kiam la resaniĝo ne certigos la restarigon de tiaj kapabloj, mi petas :
>
> 1. Ne tenu min vivanta per medikamentoj, teknikoj aŭ artifikaj rimedoj.
> 2. Oni uzu medikamentojn por mildigi miajn suferojn, eĉ se ili fruigos mian forpason.
> 3. Oni permesu al mi digne morti. Mi timas malpli la morton ol la kadukecon, fizikan aŭ mensan, la dependecon, la senesperan suferon.
>    Oni uzu eŭtanazion nomatan "aktiva".
>    (forgesi aŭ trastreki tion, kio ne plaĉas)
>
> Tiu postulo estas farita de mi en plena libereco kaj en posedo de miaj kapabloj.
> Kvankam tiu dokumento estas ankoraŭ ne leĝe agnoskita, mi esperas, ke mia parencaro kaj la kuracistoj sentos sin morale devigataj respekti ĝin. Tio havigas al ili pezan respondecon, tial por ĝin malpezigi, almenaŭ parte, mi skribas tion ĉi.

...

Ĉar la forigo de la Ordeno de la Kuracistaro troviĝas inter la neplenumitaj antaŭbalotaj promesoj, la "biologia testamento" ne baldaŭ estos agnoskita.
ADMD proponas eldoni gvidlibron de la medikamentoj celantaj mildigi memliberiĝon.

.

Malferma letero de fizika kriplulo, membro de ADMD al la kuracistar :

" ĉu eblas duonvivi kiel kriplulo ? Mi havis neneadeblan alvokiĝon por la scienco, kio implicas rigoran logikon, foje senkompatan. Nu, tiun plenplenan, ardan, fervoran vivon ni, grandaj kripluloj, ne povas havi. (. . .)
Al vi, kuracistoj, mi min turnas, dirante : mi komprenas vian sintenon konforman al via funkcio kaj al via alvokiĝo, kiu iafoje estas ankaŭ via vivkialo. Mi komprenas, ke vi provu ĉion eblan por vivigi aŭ por teni viva, biologie almenaŭ, infanon, bebon, kvankam vi ja tre bone scias, ke neniam li ĝuos plenan kaj normalan vivon.
Sed mi diras ankaŭ : Atentu, via respondeco estas tre peza. Ĉu vi rajtas kondamni estulon vivi, se ankoraŭ eblas nomi vivo tian ekzistadon senesperan, dediĉitan al konstanta malsukceso ? Ĉu vi volus por vi tian ekzistadon ? Ĉu vi akceptus ekzisti, se vi ne povus posedi kion vi posedas, kaj vin dediĉi al tio, por kio la sorto vin destinis ? Mi ja sentas, ke en la fundo de via koro vi nur negative respondas. Do, kial trudi al aliaj, kion vi ne volus por vi mem ? Pripensu la multajn suferojn, kiujn enhavas vivo de kriplulo, kaj tiam mi estas certa, ke vi ne provos, kiel vi faras, biologie vivigi estulojn kiuj ne estas faritaj por ekzisti.
Lasu agi la naturan selektadon : jen mia vidpunkto pri tiu problemo. Tiu vidpunkto estas diskutebla kaj eĉ diskutenda ; sed mi opinias, ke neniu rajtas ĝin ignori.
Mi diru lastan argumenton : ĝenerale, kiam vi parolas kun kriplulo, vi evitas diri al li la veron. Tio estas, laŭ mi, manko de kuraĝo viaflanke, sed ankaŭ fundamenta eraro. La homo - eĉ infano - rajtas scii kio trafos lin, kaj se vi ne aŭdacas fari tion necesan, almenaŭ diru la veron. La kuraĝon fari tion eble havos la koncernato mem, t.e. sin pafmortigi.
Post tridekjara luktado mi konvinkiĝis, ke tio estas la nura solvo.
Kaj kiam li petos vin, ke vi helpu por ke li mem malaperigu sin, se li tute ne havas la materian eblon memmortigi sin, tiam, kuracisto, ne hezitu, helpu lin. Tio estos la plej bona maniero por servi la homojn. Kredu min, ke, ĉar la instinkto de memkonservado estas fortega, vi ne riskos helpi individuojn, kiuj ne estos vere decidintaj sin malaperigi.
Oni povas opinii tiun malferman leteron sufiĉe stranga. La skribinto ne estas ekzaltita homo, nek homo tro obsedata pri memmortigo, sed homo, kiu batalis, kiu malsukcesis kaj logike konkludas el la lecionoj de tiu malsukceso."

J.M.D. (Tiu teksto aperis en Informilo n°4 de A.D.M.D., julio 1981).

...

El letero de membro, 79-jara ĵurnalisto :

"Ĵusaj interesaj televidaj elsendoj temis pri diversaj domoj por emeritoj kaj la tiea vivado. Nia ministro pri Sano strebas humanigi la malsanulejojn. Bone, sed restas multo farota. (...) Sed mi kritikas tiajn elsendojn ; ili estas kvazaŭ pledadoj favore al feliĉa maljunaĝo kaj fine al ili mankas objektiveco. Oni montras al ni okdekjarulojn, eĉ centjarulojn, provantajn esprimi malsinceran optimismon. Ili diras al ni, ke ili estas feliĉaj ; ĉe la ekstremo ili konfesas sian enuon. Oni konkludas, ke ankoraŭ mankas "animantoj"! Kvazaŭ oni povus kuraci la enuon vivi, kiam la vivo povas proponi nur relativan komforton : manĝi, dormi, ne tro suferi, kaj infanajn distraĵojn kiel kartludojn, domenon kaj televidon por ĉiuj. Malgraŭ la klopodoj de la filmistoj, tiu bildo de la maljunaĝo naskas ne ĝojon, admiron, sed profundan malgajon.
Ne temas mortigi la maljunulojn kaj la frenezulojn, nek trudi eŭtanazion al tiuj, kiuj ĝin ne deziras. Cetere, jen estas unu el la plej teruraj malfacilaĵoj de la problemo, ĉar en iaj kazoj ja kruelaj malpaciencaj heredontoj volonte instigus la mortonton tiel agi, kio estas netolerebla. Sed estas ankaŭ la nediskutebla fakto, ke iuj grandmalsanuloj deziras morti kaj ne sukcesas atingi tion ; unue ĉar la vivinstinkto hezitigas ilin , kaj ĉar ili ne plu havas fortan volon nek la praktikajn eblojn sin mortigi aŭ ricevi morton de kompata helpanto.
Memmortigo ne estas malkuraĝaĵo, kiel oni taksis ĝin dum mia junaĝo. Ĝi eble estas "peko" por la kredantoj, sed ni ne plu estas en la epoko, kiam la Eklezio malpermesis decan entombigon al la memmortigintoj. Kaj la Kriminala Kodo ne plu punas la elsavitojn post memmortigo."

(Tiu opinio aperis en bulteno n°6, feb 1982, de A.D.M.D.)

...

"La morton oni ne devus konsideri kiel malsukceson de la kuracistoj, nek kiel senpovecon de la medicina skipo, sed kiel biologian fakton, pli-malpli frue akceptotan..."

(El la sama bulteno)

''''''''''''''''''



Se mi allasas kaj eĉ bonvenigas la principon de memmortigo kaj eŭtanazio, mi povas kompreni, ke estas homoj, kiuj ĝin ne allasas, plej ofte pro religiaj kialoj. La vivo estas nome dia donaco kaj la homo ne rajtas ĝin malŝpari aŭ misuzi malgraŭ la dia volo. Persone mi ne kredas je Dio, tamen ne povas pruvi, ke Dio ne ekzistas, samkiel mi ne povus pruvi la malon. Se en la antikveco, almenaŭ romia, oni teknike ne povis realigi eŭtanazion, do ĝi estis nepensebla, memmortigo ĝuis grandan estimon. La malpermeso kaj kondamno de memmortigo okazis, almenaŭ en nia lando, poste sub influo de la kristanismo. Ĝi tamen plu vivas en malkristaniĝanta lando (eble malkristaniĝinta, kiu scias ?).

Se mi bone povas kompreni tion, mi ne povas kompreni, ke oni malhelpu min memmortigi aŭ akcepti eŭtanazion ; estas la rajto de ĉiu kredanto malakcepti ĝin, sed ne devus koncerni lin la fakto, ke mi ĝin akceptas aŭ ĝin deziras, pro tio ke mi respondecas pri mi mem. Logike anoj de ambaŭ sintenoj devus toleri la alian, klopodante argumenti por konvinki alipensantojn, pli ol influante (tio en la kazo de kristanoj) la leĝaron por malhelpi aliagantojn, kio estas ja formo de ideologia imperiismo. La rezulto estas iom paradoksa, oni malpermesas eŭtanazion kaj kondamnas memmortigon (ĉikaze malpermeso tutcerte ne eblus) sed permesis, almenaŭ antaŭ nelonge, abortigon. Se oni ne povas scii precize, ĉu abortigo estas krimo aŭ ne, eblas pensi ke jes, ĉar la embrio jam havas cerbajn reagojn. Sed en la kazo de eŭtanazio, kial min suferigi, se mi, kies memrespondeca estaĵo, decidas finigi miajn suferojn, pro tio, ke ne havas sencon por mi ilin daŭrigi, ĉar mi ne esperas rekompenson nek timas punon en alia mondo. Do kontraŭuloj de eŭtanazio lasu min agi, kiel mi volas, ĉu ne ?

Rimarkigo : Mi ĵus aludis pri abortigo kaj ne deziras debati ĉifoje pri tiu problemo. Mi estas por abortigo pro kialoj, kiujn mi eble pritraktos venonte, tamen povas kompreni, ke homo, kiu kredas la abortigon mortiga, emas malhelpi alian "krimon". En la kazo de memmortigo, tiu sama homo, kiu malhelpas min mortiĝi, logike ne devus havi tiun rajton.

**Robert.**

''''''''''''''

Mi ne komprenas la aserton de Robert, ke memmortigo estas kondamnata. Mi ĵus rigardis en la punleĝaro, laŭ la eldono farita de Dalloz en 1973 : la vorto "memmortigo" ne troviĝas en la fina alfabeta indekso de la libro. Ĉar kutime la indeksoj de Dalloz estas bone faritaj, mi supozas do, ke la manko de tiu vorto en la indekso signifas, ke ne ekzistas leĝo pri memmortigo. Cetere, la morto de la akuzato metas finon al la proceduro, tiel ke, eĉ se memmortigo estus delikto, oni ne povus puni la kulpinton. Mi neniam aŭdis, ke homo, kiu malsukcesis sian provon sin mortigi, estis akuzata pri "provo sin mortigi". Tiu delikto tute ne ekzistas. La franca leĝaro tute permesas memmortigon. La nura leĝartikolo, kiun mi povis trovi, estas, ke kondamnito al la mortpuno devas esti tage kaj nokte observata de la gardistoj, interalie, por ke li ne mortigu sin mem : li nepre devas morti konforme al la leĝo ! Sed tio ne plu validas ekde la abolicio de la mortpuno fare de la socialista parlamento. Do ne ekzistas leĝa kondamno de memmortigo. Escepto eble estas la malliberejoj, kie malliberuloj, kiuj malsukcesis provon sin mortigi, povas esti sendataj al la punĉelo. Krom tio, franca civitano ja rajtas sin mortigi.

La nura kondamno, kiu ekzistas, estas do la religia : normale, memmortiginto ne povas esti entombigata laŭ la rito de la katolika eklezio. Nu, mi trovas la instruon de la katolika eklezio iom kontraŭdira, ĉar aliflanke ĝi instruas, ke Jesuo memvole donis sian vivon por la savado de la homaro. Ankaŭ la martiroj povus savi siajn vivojn, se ili konsentus adori la imperiestron de Romo, sed ili rifuzis. Do efektive kristano devas fari la volon de Dio, sed nenie en la evangelioj mi trovis la instruon, ke la volo de Dio estas, ke homo vivu kiel eble plej longe. Ŝajne eĉ ekzistis en la katolikaro la mala opinio, ĉar mi memoras, ke en liceo Pierre Corneille terure tedis min dum tuta trimestro per sia tragedio "Polyeucte". Jen la temo : tuj post sia bapto, sankta Polyeucte decidas, ke li nepre devas morti martire. Bedaŭrinde, la paganoj ne volas lin mortigi, kaj dum 5 aktoj li serĉas la helpeman paganon, kiu bonvolos fari al li tiun servon. Efektive, Polyeucte ne rajtas sin mem mortigi, li nepre devas trovi iun, kiu bonvolos mortigi lin. Ŝajne la konvinko de Corneille estis, ke kristano devas morti plejeble frue post sia bapto, sed per pagana mano. Se tiel estas, estas dezirende, ke ne konvertiĝu la tuta homaro, ĉar alie ne plu restos iu por sendi al la ĉielo la novbaptitojn. Tiun teatraĵon mi trovis terure idiota, kiel cetere la plimulton de la verkaro de Corneille. En la vilaĝo de mia parencaro, la malpermeso entombigi religie la sinmortigintojn ne estas aplikata, ĉiam la pastro trovas bonan pretekston, la mortinto estis deprima, li ne plu estis 100 % konscia, do ne reale kulpa, ktp. Nu, se oni ne kredas Dion, logike oni devas tute indiferenti, ĉu oni estos entombigata religie aŭ ne. Sed religia entombigo povas esti utila por la familio, se ĝi mem estas katolika. Mi faris donacon de mia korpo al la medicino, kaj mia propra deziro estus, ke ne okazu pri mi religia ceremonio. Tamen mia kuzino, kiun mi elektis kiel personon, al kiu eventuale oni devus sciigi akcidenton pri mi, havas kiel instrukcion de mi ne rifuzi rekvieman meson, se iu en la familio ĝin dezirus. Se la sorto de mia animo malebligas mian onklinon dormi nokte, nu bone, oni faru la ceremonion, ne por mi, sed por la onklino.



Do, krom la religia, ne ekzistas en Francio kondamno de sinmortigo. Kio ekzistas, estas la leĝo pri la devo helpi al persono en danĝero. Ŝajne la jurisprudenco estas, ke oni nepre devas helpi homon riskantan morton, eĉ se li aŭ ŝi mem tiun morton deziras. Fakte tio estas interpreto de la leĝo, ĉar en la leĝo mem la kazo de memmortigo ne estas menciita. Laŭ tiu leĝo, kuracisto nepre devas lavi la stomakon de homo, kiu englutis fortan dozon da dormigiloj. Post la stomaklavado, la "malsanulo" estas sendata al psikiatria malsanulejo. Nu, dum miaj restadoj en psikiatrejoj, la plimulto de miaj kunulinoj estis virinoj, kiuj englutis medikamentojn. Neniu el ili riproĉis la kuraciston, kiu faris la stomaklavadon, kaj neniu parolis pri rekomenco de la provo sin mortigi (en la psikiatrejo mem, tute ne eblis fari tion, sed ŝajne neniu intencis rekomenci post la eliro el la malsanulejo). Tiuj virinoj ne reale volis morti, ili volis nur altiri al si la atenton de siaj proksimuloj kaj de la socio (plej ofte, ili havis terurajn problemojn kun la edzo). Estas vero, ke ili reale akceptis la riskon morti : se la stomaklavado ne intervenus sufiĉe frue, ili mortus. Sed ilia vera deziro estis,

ke la kuracisto intervenu. Mi vidis almenaŭ unu kazon, en kiu la interveno de la kuracistoj estis tre laŭdata de la virino : ŝi prenis medikamentojn, ĉar ŝia paro dronis en financaj problemoj. Post tio, ŝia edzo venis ĉiutage al la psikiatrejo, portis al ŝi florojn kaj montriĝis tiel tenera, ke ŝi deziris eliri la malsanulejon kiel eble plej rapide por daŭre vivi kun li. Ĉe ŝia eliro, ili vidis sian situacion multe pli optimisme, kaj pensis, ke la financajn problemojn ili povos iel solvi.

Do racie mi pensas, ke, ĉar neniu homo mem decidis veni en la mondon (nun gepatroj povas decidi venigi homon en la mondon, sed kredeble oni neniam inventos manieron, per kiu la venonto mem decidos naskiĝi), se tie li ne sentas sin bone, li rajtas eliri. Se oni metus min perforte en ejon, kie mi suferus, kompreneble mi rajtus foriri. Jes ja, sed la eraro de raciistoj estas kredi, ke homo pensas racie. En la realo, la decido sin mortigi dependas ne nur de la racio, sed ankaŭ de la subkonscio. Eble ekzistas reale racia, zorge decidita volo sin mortigi. Sed ekzistas ankaŭ la "rusa ruleto" : la homo ne volas morti, li (aŭ eble pli ofte ŝi) deziras, ke oni pli atentu pri li (aŭ ŝi), kaj, por akiri tiun atenton, prenas la riskon morti, sed tio estas nur risko, kaj la reala deziro estas, ke oni savu ŝin (aŭ lin), kaj poste helpu lin aŭ ŝin trovi solvon al siaj problemoj. Kiel distingi tiujn kazojn ? Nu, laŭ la psikiatroj (sed ĉu tio ne estas nura sinpravigo ?), tiuj, kiuj reale deziras morti, ne malsukcesas sian provon. Do tiuj, kiujn oni savas, fakte deziris tiun savadon, kaj estas nur bedaŭrinde, ke parto de tiuj, kiuj ne reale deziras morti, tamen ne estas savataj, ĉar la stomaklavado ne intervenas ĝustatempe. Tiuj homoj iel estis viktimoj de akcidento : ili perdis ĉe "rusa ruleto". Do en la praktiko la demando ne estas tiel facile respondebla, kiel en la teorio. Se mi alvenus en la loĝejon de amikino, kaj konstatus, ke ŝi estas senkonscia apud malplena tubo da dormigiloj, ĉu mi vokus SAMU, aŭ ĉu mi lasus ŝin morti trankvile (riskante punon pro nehelpo al persono en danĝero) ? (noto : SAMU estas en Francio speciala teamo de medicinistoj, kiu intervenas en urĝegaj kazoj). Ne pro religia aŭ filozofia konsidero, sed pro

(daŭrigo p. 41 !)



Jara Kunveno de la Vaŭkluza federacio
************************************

Ĝi okazis en SAINT-REMY DE PROVENCE la 23an de Majo '82.
Je la deka : vizito de la du antikvaj monumentoj, de la urbo GLANUM kaj de la klostro SAINT-PAUL DE MAUSOLE.
La trideko da partoprenantoj gaje piknikis ĉe la lago. Kiel kutime Hélène GENTE kompetente deĵoris ĉe la libro-servo. Roger MOTTO prezidis. Post bonvenaj vortoj, li donis la parolon al André GENTE, la sekretario, kiu prezentis la raporton pri la agado en la jaro. Unue, li rimarkigas ke ĉeestis 60 okaze de la unua pikniko vaŭkluza en 80, ni estis 40 en 81. Nur 30 en 82! Kiom da en 83 ? Eble la griza vetero malkuraĝigis niajn amikojn el AIX kaj NIMES ?
a)perfektiga kurso departementa : ĝi estis sukcesa . Sekvis ĝin pli malpli regule 9 partoprenantoj. Oni pritraktis 7 paŝojn de AULD kaj 5 seriojn de Atesto pri Kapableco. Daŭrigo en la venonta jaro.
b)kontraŭe, la Konversacia Rondo departementa tute fiaskis, ĝi ne okazos.
c)la kulmino de la agado en la jaro estis ŝajne la Zamenhof-Tago en ORGON. Pli ol 70 amikoj el 6 departementoj.
d)Estis elektita SAINT-REMY kiel printempa rendevuo. Sed jam dufoje, preskaŭ neniu partoprenis el AIX kaj NIMES. Feliĉe venis amikoj el ALES, CREST, MARSEILLE kaj PARADOU.
e)Nia ligilo "ESPERANTO-VAUCLUSE" bone fartas. La dekan n-ron ricevis pli ol 120 esperantistoj. Ŝajnas ke ĝi vere utilas, kaj fariĝis vera ligilo inter vaŭkluzanoj, sed ankaŭ inter la esperantistoj de la departementoj 13, 30 kaj 84, se ne paroli pri aliaj.
f)Koncerne la viziton de eksterlandanoj estis nigra jaro ! SARIKOV duafoje ne venis. Poste ILOV "sarikovis". Nuntempe ni atendas TYBLEWSKI.
g)Okazis semajno-fino por komencantoj en Novembro 81. Bedaŭrinde, nur "avinjonanoj" partoprenis en ĝi. La 6an kaj 7an de novembro 82 okazos dua semajno-fino por komencantoj en Kastelo Barbière. Jam kelkaj nimanoj intencas partopreni.
h)Ekzamena sesio okazis en AVIGNON la 13an kaj 14an de majo. Sep trapasis sukcese la Ateston pri Elementa Lernado, unu sukcesis la Ateston pri Praktika Lernado kaj du trapasis la skri-

ban parton de Atesto pri Kapableco.
Post la aprobo de tiu raporto pri la vaùkluza agado, oni pli detale raportis pri AVIGNON, CARPENTRAS, ORGON, VAISON, ARLES, AIX, MARSEILLE, ALES kaj CREST.

André DELAYE, la kasisto, prezentis la financan raporton. Je la 31.12.81 restis en la kaso 412,20 FF. 33 pagis la abonon en 81. Jam 55 pagis ĝin en 82. Iu proponis la plialtigon de tiu "ĉipa" kotizo. Post debato ĝi restos fiksita je 8 F por 83. Kompreneble ne estas malpermesite ĝiri pli!

La tria parto de la tagordo konsistis el elekto de administrantoj. Ĉi-jare tri mandatoj finiĝas. Jane DELORME kaj André GENTE rekandidatas. Simone HUMM anstataùas Michel NICOLAS.

Diversaĵoj : Zamenhofa Tago : ĉiuj akordiĝas pri la dato : 12/12/82. Daniel MOIRAND rilatos kun Georges CAU. Estus dezirinde ke la aliĝilo aperu en "ESPERANTO-VAUCLUSE" ĉ. la unua de Oktobro.
Printempa Pikniko : post debato oni decidis komune fiksi la lokon en AIX venontan decembron.
Semajno-finoj - por komencantoj : jam la Kastelo Barbière estas rezervita. La aliĝilo troviĝos en la oktobra "E°-Vaucluse". Estus bone, ke ĉiuj grupoj profitu tiun okazon por varbi novajn lernantojn!
- diversnivela : Daniel MOIRAND sin proponas por helpi se ni kuraĝas starigi ĝin venontan vintron.
En la aùtuno Max-Roy CARROUGES kantos en AVINJONO. Informojn venontan oktobron.
En la nomo de Simone HUMM, Roger MOTTO anoncas, ke la Provenca Federacia Kongreso okazos en AVIGNON en 83.
Perletere Renée TRIOLLE anoncas "informan renkonton" kun la internacia lingvo en SANARY.

Ĉirkaù la sesa okazis la disiĝo post multaj amikaj babiladoj.

Komunikis A.Gente.

**********************************************************

TULUZA ESPERANTO-SOCIETO aranĝis la 25an de majo Brazilan Vesperon. En la programo : filmo pri la U.K. en Brazilia, muziko, kantoj. Artikoloj aperis en LA DEPECHE kaj SUD-OUEST. Tuluza E-Societo : CRDP, 3 rue Roquelaine, 31 TOULOUSE.



Instituto pri Disvolvado de Riĉofontoj reigeblaj :

STAĜO PRI KONIGO DE MAKISO, de la 12a ĝis la 17a de JULIO 82
**********************************************************

La instituto estas asocio laù leĝo 1901, kies celo estas defendo de naturo kaj vivmedio per ĉiuj ekologiaj rimedoj :
- revivigi makison bruligitan (estas 8 ha revivigitaj per plantadoj diversaj)
- ŝparadoj de la krudaj materialoj kaj energioj
- esploro pri suna energio (aktiva kaj pasiva).

Ni organizas staĝon (12a/17a de julio) : Eblas alveni la antaùtagon aù foriri la morgaùon de tiuj ĉi datoj. La reĝimo estos "sovaĝa" kaj senpaga tendumado sur nia tereno. Nutrado kolektive preparita kaj aĉetita. La vivregulo estos memmastrumado kaj la restado kiel eble plej ŝparema. Partoprenantoj limigitaj je 20.
Estos necese havi tenduman materialon (kvankam eblos bivaki ĉar la vetero estos bela!).
Por aliĝi, skribu viajn nomon, antaùnomon, adreson kaj aĝon kaj sendu 50 FF por ĉiu persono por la unuaj elspezoj pri memmastrumado. Ni konfirmos vian enskribiĝon aù resendos vian ĉekon. Ne eblos repagi vian antaùpagon, se lastmomente vi rezignas pri la restado. Ĉion adresu al : Paul TOURON 3 rue de Combret, F 30000 NIMES. Tel(66) 64 03 22.

Nia tereno troviĝas en NIMES, 1636 chemin de la Calmette.(*)

**********************************************************

Amika Esperanto-Rondo Aĝenia : Ni ne tute mortis ! Kvar(4) personoj ĉeestis la Ĝeneralan Asembleon de nia Grandioza grupo la 15an de majo. Prefere malmulte ol nenio, ĉu ne ? La babilado tamen viglis. La grup-oficistaro kompreneble sukcesis plu monopoligi siajn postenojn ĝis la venonta Ĝ.A. kaj ni ne malesperas :
Du eblecoj renkontiĝi denove en aùgusto en la stacidomo de Laroque Timbaut (kun ebleco tendumi en Beauville) : la 14an kaj 15an de aùgusto kaj la 21an kaj 22an de aùgusto. Dum tiuj du semajnfinoj granda festo aranĝita de SAT-broŝurservo! Oni faldos, paperkolektos, bindos, gluos, tranĉos, samtempe babilos pri temoj poste proponotaj al la ĉen-leteroj de "Laùte!" (tio jam "funkciis" sukcese pasintan jaron, do...), piede ekskursos se restos energio, ktp, ktp. Kiuj venos de

(*) fino sur p. IV !

malproksime kaj volos restadi surloke por kviete masoĥismumi de la 16a ĝis la 20a de aŭgusto (inter ambaŭ semajnfinoj) tiuj povos tendumi aŭ en Laroko (oficiala tendumejo) aŭ en Beauville (sovaĝa). Ni aranĝos la manĝojn kolektive, laŭ ĉies emoj. Skribi al : C.Baudé, 47340 Laroque Timbaut, aŭ telefoni (1653)95 71 28 - matene.

La 29an de majo, AERA-ano ĉeestis la kongreson de "Union des Anarchistes" (Anarkista Unio) en FUMEL kaj tie salutis senmandate nome de SAT-Amikaro (aŭdaco ne mankas al ni!). La 5an de junio okaze de liberecana festo apud AGEN la sama AERA-ano ĉeestis kun iom da E-materialo. (rezulto kvazaŭ nula).

**********************************************************

TULUZO : Esperantistoj de Tuluzo kaj proksima regiono, aŭskultu la "liberajn radiojn", kiuj elsendas niajn informojn. Danku ilin :

- Radio Cambo - 103 MHZ - informas de la 13a ĝis la 14a. Tel : 20 20 88
- Radio Canal Sud - 88,6 MHZ -

Aliaj liberaj radioj ricevas niajn komunikojn, sed ni ankoraŭ ne scias, ĉu ili ilin elsendas.

**********************************************************


Anonceto : "Mi estas 26-jara junulino, kiu laboras en kliniko kaj ĝardeno por infanoj, kiel medicina fratino. Mi interesiĝas pri medicino, historiaj legendoj, turismo kaj aliaj temoj. Mia adreso : Nano Sneĵana Marinova Stefanova, GABROVO 5300, strato "Lenin" N° 54b et.III. , BULGARIO"

**********************************************************

Ĝirondio : Pri lotumado de SAT-Amikaro. La bileto n° 3263, kiun vendis la Bordoza grupo gajnis loton. La feliĉul(in)o, kiu havas tiun bileton skribu al : M. DEMONTOUX, 2 rue Fr. Lévêque, 33000 BORDEAUX. Tuj ŝi sendos al vi la belan loton.

**********************************************************

Staĝo pri Konigo de Makiso (vd.p.III!)Jen iom el la ebla programo : - protektado k ekkono de makiso; kiel rekoni, kolekti, uzi la utilajn plantojn; ICEM-movado; Esperanto, rimedo por internaciaj interŝanĝoj; akupunkturo kaj naturaj medicinoj ; la alergioj; preparo de herbaro ; fabrikado de papero el-uzitaj paperaĵoj... Laŭplaĉe ĉiu elektos temon. Eblos kolektive revizii aŭ kompletigi tiun programon.






# INTERNACIA EKSPOZICIO PRI INFANA ARTO

**************************************************

okazis de la 4a ĝis la 15a de Majo en CENON (F)

-:-:-:-:-:-

En ĉi monato Majo CENON, komunumo de la Bordoza Urbaro (sudokcidenta Francio), festis la centan datrevenon de la leĝoj, kiuj en Francio igis deviga la unuagradan lernadon, kaj senpaga kaj laika la publikan instruon. La ESPERANTO-FAKO en la loka Kulturdomo opiniis la okazon oportuna por organizi imponan ekspozicion.

Du ĉefaj ideoj naskis ĝin :

- valorigi la infanan grafikarton tro ofte ignoratan aŭ iom tro malestime taksatan ;
- montri al la publiko per konkreta pruvo, ke Esperanto aparte taŭgas por komuniki, kaj efektivigi ampleksan projekton, eĉ kiam oni disponas ne multe da monrimedoj.

Per dudeko da leteroj al E-korespondantoj, kaj anonco en dutri E-gazetoj, la E-Fako de la Kulturdomo en Cenon-Palmer tuŝis jen rekte, jen nerekte geinstruistojn tra la tuta Mondo. Rezultato : de 30 landoj (Argentino, Aŭstralio, Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉilio, Danio, Estonio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Islando, Italio, Izraelio, Japanio, Kanado, Koreio, Litovio, Nederlando, Pollando, Portugalio, Ruando, Sovet-Unio, Svedio, Svisio, ankaŭ komprenebla Francio.) venis multnombraj kaj ĝenerale valoraj desegnaĵoj kaj pentraĵoj. Pli ol 800 !... Bedaŭrinde necesis iom severe selekti, tial, ĉar en la ekspozicio-salonego la uzebla surfaco ne ebligas elmontri pli ol 400 verkaĵoj.

La lokan partoprenon certigis gelernantoj el Cenon, Floirac, Artigues-près-Bordeaux (najbaraj komunumoj), kaj precipe la Pedagogia Centro pri Belartaĵoj, kiu pruntedonis verkaĵojn faritajn en klasoj, kie la infanoj laboras laŭ la FREINET-pedagogio.

La ekspozicio ne havis altruditan temon ; junaj verkintoj ĝuis senliman liberecon en elekto de temo, ankaŭ de materialo. Tamen estis limo rilate aĝon : de ses ĝis dek-tri jaroj. Kial tia limo ? Tutsimple, ĉar en preskaŭ ĉiuj landoj la unuagrada instruado koncernas tiomaĝajn geknabojn. Cetere, dum tiu aĝ-

periodo la infanoj ankoraŭ plejparte konservas siajn inspir-freŝecon kaj esprim-spontanecon.

Rigardante la kunigitajn verkaĵojn, ni konstatis, ke ĉiuj infanoj,kie ajn ili vivas, prezentas sian ĉirkaŭaĵon, realan aŭ imagan ; precipe tion, kion ili ŝatas, sed ankaŭ tion, kio maltrankviligas aŭ timigas ilin. La personecoj travidiĝas ; estas malrevuloj kaj fantaziuloj, inventemuloj kaj kopiemuloj ; iuj skizas, aliaj rafinas, kelkaj amas senvivajn objektojn dum aliaj ludas per linioj aŭ koloroj... Iuj videble ricevis specialan instruadon pri desegno kaj pentrado; tiuj gajnas lertecon rilate al uzado de la iloj kaj materialo, perdas iom da spontaneco, tamen volonte pritraktas siajn infanajn temojn, se la instruist(in)o ne trudas aliajn.

Vizitantino miris, ke "ne videblas desegnaĵoj kun soldatoj kaj armiloj!". Fakte, el la 800 verkaĵoj troviĝis nur unu bildo pri soldato salutanta en parada uniformo. Tamen, ve! armilo ĉeestas sur unu el la du desegnaĵoj, kiuj rakontas senjuĝan ekzekuton viditan de la desegnintoj sur Irana strato !

En tiu ekspozicio ĉiuj artaĵoj estis esprimoplenaj ; multaj estis belaj, pluraj altkvalitaj laŭ la belarta vidpunkto.

Koncerne la teknikojn, ni konstatis riĉan diversecon:
- krokizo per krajono - farbado per kolorkrajonoj aŭ feltkrajonoj - paŝtelo - guaŝo - opaka akvofarbo
- pasteca farbo lasanta reliefajn spurojn - preso sur jam farbita vitroplato - vitraloj sur travidebla plastaĵo - tuĉado - preso per negative gravurita linoleumo - gluado de eltondîtaj paperoj - kunigo de diverskoloraj tukopecoj eltonditaj - kunigo de diversaj materioj : sorba vato, grajnoj, metalaj fadenoj, fajlaĵoj, ktp... - brodado, tapiŝoj el lano - argilo sekigita, bakita, pentre ornamita - ceramikaĵoj
- ilustritaj infanaj rakontoj...

La inaŭgurado okazis la 3an de majo. Ĉeestis S-roj P. GARMENDIA, Deputito en la Nacia Parlamento, R. BONNAC, Urbestro kaj Departementa Konsilanto, GRUYER, Instruinspektoro komisiita de la Akademia Rektoro ; ankaŭ geinspektoroj, gelernejestroj el Cenon, Floirac, Bordeaux, multaj geamikoj esperantistaj aŭ neesperantistaj; entute ĉ. 120 personoj.



Ĝi restis malfermita dum du semajnoj ; senpaga estis la vizito, tiel de la plenkreskuloj, kiel de la infanoj. Ĝin vizitis ĉ. 45 klasanaroj sub gvidado de la koncernataj geinstruistoj : entute 850 gelernantoj el elementaj lernejoj de Cenon kaj ĉirkaŭa regiono. Krom la infana publiko ĝin vizitis inter 500 kaj 600 diversaĝaj plenkreskuloj. Multaj el tiuj spontane esprimis sian agrablan surprizon pro la altnivela kvalito de la ekspozicio. Ankaŭ sian miron, ke oni sukcesis arigi tiom da belaj infanverkaĵoj el tiom da diversaj malproksimaj landoj ; kaj ili konkrete konstatis, ke Esperanto konsistigas seriozan kajefikan komunikilon. Kompreneble ankaŭ propagandbudo pri Esperanto staris en konvena loko ĉe la ekspozicio-salonego mem !

La 15an de Majo fermiĝis la pordo de la ekspoziciejo... Kelkaj artaĵoj reiras al la pruntedonintoj laŭ deziro esprimita de ĉi-lastaj. Plej multaj restas kaj konsistigas stokon, kiu de nun fariĝas posedaĵo de la Ĝirondia Grupo de Laboristaj Esperantistoj. Pri destino de tiu riĉaĵo nenian definitivan decidon ankoraŭ alprenis la grupanoj. Post la somera feriado, en venonta septembro, supozeble publikiĝos informoj pri tiu materialo...

<u>Anoj el la Ĝirondia Grupo de Laboristaj Esperantistoj</u>.

*************************************************************

De kelkaj semajnoj Radio-Polonia ree elsendas en E. Ĉu dank'al la alskribo de esperantistoj ? Feliĉe estas loka E-elsendo de la liberecana radio en Parizo, sed ege gravas leteroj de aŭskultantoj; ĉar elsendoj ne havas statistikojn, ege gravas leteroj de aŭskultintoj aŭ simpla peto pri la programo. Ĵus ĉesis elsendi en esperanto loka stacio de Sorocaba. Se ni estus are skribintaj, Portugala Radio tutcerte plu elsendus en esp-o. Kiam la elsendoj ĉesis, estis nenia sciigo en la tuta E-gazetaro, eĉ ne en la organo de UEA. La prestiĝo kaj la disvastiĝo de E dependas parte de elsendoj, kies internacia karaktero ne devus esti kontraŭa al la Internacia Lingvo. <u>R.Pontnau</u>.

## LA INDIVIDUALISMA SOCIALISMO

Multaj homoj pensas, ke la nuntempaj konoj estas pli multnombraj, pli sciencaj, pli funde esploritaj, pli liberigaj, pli homecaj ol en la pasintaj tempoj. Grava, danĝera, tro sinfida pro orgojla eraro ! Legu la broŝureton de Félix Lagalaure :

" La individualisma socialismo de D-ro Axel Robertson Proschowsky el Nico (Francio) "

Vi scios, kiel kuracisto eltrovis novan medikamenton ; kiel li konceptis la neceson zorgi pri la bonfarton de ĉiuj homoj.
Li estis ankaŭ botanikisto, kies ĝardeno, pri kiu li mem zorgis, estis vizitata de fakuloj.
Saĝaj estis liaj sociaj teorioj. Li tute konsciis la homajn bezonojn, korpajn kaj mensajn, ekvilibrigajn. Li jam konsilis manlaboradon, kiun li mem praktikis, dum libertempo.
Laŭ li, laboro ebligas kontentigon de la vivaj bezonoj de ĉiuj homoj, kontentigon, kiu ebligas sendependecon, sendependecon garantiitan de grupado kaj atingon de feliĉo.
Sendependeco naskas interrespekton kaj "Noblan konkuradon". El la "ismoj" li elektis : el komunismo, tion, kio necesas, el anarkismo, tion, kio eblas... por starigi konstrupovan sistemon.
Kiel ŝtatestroj estu ne ambiciulaĉoj, sed moralaj homoj.
Kion diri pli ? Ke li estis favora al internacia lingvo spite sian scipovon de pluraj lingvoj.

Tiu resumo entenas apenaŭ la esencon de la verko ; mi ege bedaŭras, ke la broŝureto entenas nur 16 paĝojn kun portreto de D-ro A.R.Proschowsky. Certe la leginto deziros pli detale scii pri tiu ne tre konata diversfaka pioniro.

Mendu ĉe : Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut (2FF)*

G. Roux.

* La broŝurabonantoj aŭtomate ricevos ĝin. (red.)



La penso de Epikuro
*******************

Aperis la 14a (!) broŝureto eldonita de Portugala Eldona Rondo. Ĉu vi ankoraŭ ne mendis la jam aperintajn ? Alia teksto de la vere universala Prof. Agostinho da Silva : "La Penso de Epikuro". En 14 paĝoj konciza kaj facile legebla skizo pri "epikurismo", Epikuro kaj lia epoko. Mi multe ŝatas la aŭtentan epikurismon. Mi do ne povas recenzi objektive. Mi povas nur rekomendi tiun legaĵon al ĉiuj : tiel al tiuj, kiuj jam pli-malpli epikuras, konscie aŭ ne, kiel al tiuj, kiuj deziras havi pli ĝustan vidpunkton pri filozofio de la ĉiutaga vivo, kaj kies karakterizo estas saĝo kaj ekvilibro, sen tabuoj.

"Laŭ Epikuro la malfeliĉo de la homo kuŝas en tio, ke oni predikis malpermeson de tiuj naturaj manifestadoj de la vivo, kaj tiel kredis korpan kaj spiritan staton, kiu malebligis al li atingi la stadion de perfekta scio." : Tiun frazon mi ne tre bone komprenis. Eble mankas vorto ? La cetero estas bonege tradukita. Estas apenaŭ unu-du tajperaroj. Gratulojn al tiu kolego !

Kribo.

Eratume
*******

En mia libreto "...el la kara infaneco", p.85, troviĝas enigma vorto : pinamelo. Kio povas esti amelo de pino ? Evidenta eraro. Tiel evidenta, ke ĝi pasis, de ĉiuj nerimarkita, ĝis kolegino de Kdo Lentaigne demandis al li : kio estas pinamelo? Temas pri tiu frukteto de pinio, kiu estas frandaĵo por sciuroj kaj homoj. Mi pensis : migdalo, kaj mi skribis : amelo, verŝajne influite de la okcitana "amelo" aŭ "amenlo" (= migdalo). Laŭ PIV la ĝusta nomo estas pinisemo. Mi preferas : pininukso. Nukso estas ja ĝenerala termino por juglando, migdalo, avelo, kokoso, arakido ks.
Inter la legantoj de Laŭte sufiĉe multaj posedas mian verketon. Ili bonvolu korekti, kaj pardoni mian fuŝaĵon.

Valo.

**************************************************

Denove disponebla, reeldonita fote en eta kvanto, la broŝuro : "Al la junuloj kaj Biografio" de Petro Kropotkin. Formato:A6. 54 paĝoj. 8FF kun afranko, ĉe SAT-Broŝurservo.
(Tiun broŝuron ne aŭtomate ricevos la bs-abonantoj).

Pri la naŭa ĉapitro de "KIEL DIRI...?"...
****************************************

El letero de Gisella MARCHIONI (Italio) :

Mi legis kun vera plezuro vian "KIEL DIRI?" kaj mi intencas studi ĝin de la komenco ĝis la fino. (Nun, mi ĵus komencis). Vi skribis, ke vi atendas konsilojn kaj kritikojn de la esperantistoj, do mi kuraĝas sendi al vi kelkajn proponojn pri temo iom "malpruda" : la naŭa ĉapitro.

1) Laŭ mi, Esperanto bezonas raciigon de la seksaj afiksoj. Ekzistas solvo tute natura kaj "esperanteca", kiun vi vidos sur la sekvanta paĝo de ĉi tiu letero. Eble mi ne elektis la plej trafajn ekzemplojn, sed vi povas mem provi. Estas evidente, ke simpla radiko NE entenas seksan ideon. "hom" "infan" "kat" "bov" "instruist" ktp. estas neŭtraj aŭ indiferentaj. Vi proponas "EKSBOVO", sed kastrita bovo estas tamen bovo ! Laŭ mi, "eksbovo" estus taŭga vorto por bova kadavro, aŭ aliformiĝinta bovo (En la fabeloj : eksrano-princo). La solvon per "-UKO" mi trovis en "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto".

2) "Prostitui" estas aktiva verbo ; do "senlicenca prostituiĝado". Mi ne kredas, ke en Francio estas licenco por prostitui aliajn personojn ; en Italio, oni arestas la prostituistojn aŭ prostituantojn, se nur pruvitas ilia prostituado.

3) Inter la nomoj de la seksorganoj, mankas la plursignifaj "faluso" (simbolo de la viruĉa potenco, laŭ FREUD) kaj "sino" (matriarĥa simbolo).

4) Mi trovis preserareton : "samseksuloj" anstataŭ "samseksamuloj". Mankas "aliseksamuloj" kaj "ambaŭseksamuloj", "sadismuloj" ktp.

Bonvolu akcepti mian malgrandan kontribuon al via "apetitveka" KIEL DIRI ?, kiun mi ĝuas/is/os kaj altgrade ŝatas.

---

sekvas la ĉi-apuda propon-tabelo :

---



(daŭrigo) Pri la naŭa ĉapitro de "KIEL DIRI...?"...
****************************************

| | | |
|---|---|---|
| uĉo | | ino |
| uĉa | inuĉa | ina |
| viruĉo | (HERMAFRODITA) | virino |
| bovuĉo | | bovino |
| boviduĉo | | bovidino |
| bovuĉjo | bovjo | bovinjo |
| bovĉjo | (NEŬTRA) | bovnjo |
| | bovuko (KASTRITO) | |
| | gebovoj (AMBAŬ SEKSOJ KUNE) | |

VIR = plenkreska persono, ĉu homo aŭ..aliplanedano.

(u)ĉjo kaj (i)njo estas la karesaj formoj sekso-montraj, do -jo estas la neŭtra (aŭ geseksa).

Ekzemploj :

- Eŭnuko estas viruko gardanta haremaninojn.
- Ŝafukaĵo estas viando de kastrita ŝafo.
- Uĉilo kaj inilo estas popolaj (netrivialaj) nomoj de la seksorganoj.
- Oni uzu la pronomon "li" por viruĉo, la pronomon "ŝi" por virino, sed uzu "ri" por persono (ĉu infano aŭ viro), kies sekso estas nekonata aŭ tiukaze indiferenta.
- "Knabuĉoj kaj viruĉoj estas homuĉoj, sed bebuĉoj, infanuĉoj kaj knabuĉetoj estas homiduĉoj". En ĉi tiu ekzemplo, la seksa sufikso estas tute superflua, eĉ ĝena. Oni devus uzi la seksajn afiksojn (ge, in, uĉ), nur kiam la senco ilin postulas.
- La abelo transportas polenon de floruĉo al florino.
- Uĉfiliko estas filiko, kiun oni konsideras "uĉeca", inŝraŭbo estas ŝraŭbingo, kiam oni konsideras ĝin "ineca". Inknabuĉo estas ...
- Petr(uĉ)o → Petruĉjo → Peĉjo / Petĉjo

Katarino → Katarinjo → Kanjo / Katnjo

Rilate al la rubriko "Kiel instrui e-on" en "Laŭte" mi havas kelkajn rimarkojn.

Ĝis nun - n-ro 42 - estas pritraktitaj nur konsiloj al kursgvidantoj. Ekzistas ja ankaŭ homoj, certe tro malmultaj, kiuj interesiĝas pri la lingvo kaj volas lerni ĝin pere de libroj, aŭtodidakte, ĉar alia maniero pro manko de najbaraj e-istoj ne troveblas. Tiudirekten estas rekomendataj metodoj, kiujn oni povas resumi en du kategorioj : la t.n. gramatika kaj "natura" metodoj.

Ofte interesuloj ne posedas la gramatikan bazon en siaj naciaj lingvoj por bone kompreni la "sciencan" sistemon en e-o. Aliflanke kaŭzas la parkera lernado de vortoj kaj reguloj kapdolorojn, kio certe timigas la scivolemulojn. La "natura" metodo prezentas legmaterialon, kiu progresive enkondukas en la fremdan materion, sen parkera lernado.

Ĉu - kaj tio estas mia demando - praktikantoj kaj spertuloj povas verki artikolojn pri tiu temo en iu venonta "Laŭte!" ?

Kurt Schut.

La red. konfirmas : Bonvenon al tiaj artikoloj ! Ni ne havas tiajn nuntempe en la tirkesto...

*********************************************************

En la 40a n-ro de LAŬTE mi legis strangajn frazojn en la kadro de la artikolo "Malferma respondo al anarkista kamarado". Jen la koncernaj frazoj : "Kaj mi celas al socio daŭre memmastrumata de la popolo mem, kaj ne al senĉesaj detruoj kaj rekonstruoj de la kapitalista sociordo fare de anarkiismo helpe de aristokratismo, teokratismo, teknokratismo, demokratismo, liberalismo, socialismo, komunismo kaj individuismo, kiuj estas la farboj, per kiuj oni laŭvice ŝmiras la publikajn benkojn, malhelpante la publikon sidi sur ilin pro la ĉiam freŝa nova ŝmiraĵo. Anarkiismo estas la ĉevalo, kiun rajdas la kapitalismo, aŭ morto, la kvara rajdanto de la Apokalipso, kiu jam de kvar jarmiloj detruas la Homaron per "la sovaĝaj bestoj de la Tero", tio estas : la aristokratoj, la teokratoj, la teknokratoj, la demokratoj kaj tiel plu... Kiam iu ne plu taŭgas por sia ofico, oni tuj anstataŭigas ĝin per la sekvanta, kaj tiel ĝis individuismo, kiu rekomencas alian ciklon."



De tridek jaroj mi agadas en la anarkistaj medioj. Kaj ĝis nun, ĉu en la verkoj, ĉu en la agoj de la liberecanaj aktivuloj, mi neniam trovis rilatojn inter anarkiismo kaj aristokratismo, teokratismo, ktp.
Ĉu kamarado B.G.D. povos doni ekzemplojn por klarigi siajn dirojn ?

Yves PEYRAUT.

*********************************************************

## P E R F O R T O

## N E P E R F O R T O

Estas malfacile pritrakti la temon... ĝi estas kompleksa. Fakte, en iaj cirkonstancoj neperfortulo havas kontraŭajn vidpunktojn. Ekzemple, pri la detruo de instalaĵoj en GOLFECH dum manifestacio. La plejmulto da civitanoj, misinformataj, atentas nur pri tiaj agoj, kiujn ili malaprobas. Tiuj homoj ne elstudis la nuklean problemon, kaj, inside, oni provas konvinki ilin, ke ĝi estas altrudata neceso de la homsocio-evoluado ; plie, oni kaŝas la egan nocivon, kaj oni certigas, ke la nura alternativo estas : nuklea centralo aŭ ne plu tiom uzi elektron.

La publiko ne konscias, ke tia trudado estas perforto ; sed antinuklea manifestacianto ĝin suferas, kaj pli bone komprenas la malesperan agon de iuj el ili. Fronte al la polica subpremo, kaj al la firma ŝtata decido malesperiga, eĉ neperfortulo tiam perforte reagas ; sed li tute malaprobas frakason de montrofenestroj de juvelistoj, kiel okazis en Tuluzo. Tiaj agoj estas malfavoraj al la kontraŭnukleaj homoj, en la spirito de la publiko lerte misinformata.

Mi ĵus aŭskultis dissendon pri psikanalizo. I.a. mi memoras tion : "Ni ĉiuj estas influataj de nia en-utera vivo. Tie okazas senindulga batalo inter la patrino kaj la feto, fonto de nia angoro... ĉiu estas esence formita de angoro.." "ĉiam okazis, ĉiam okazos militoj pro tia angoro..." "sen ili (militoj) la specio ne plu vivus."
Kia malesperiga aserto, ĉu ne ?!
Mi esperas, ke li, kvankam psikanalizisto, misopinias, aludinte

pri... estonta milito, buĉado, kiu pereigos miliardon da homoj. Li konsideris tian perdon tute ne grava.

Kelkaj rimarkigas tion : "Laŭ natura leĝo, ĉiu estaĵo vivas, manĝante alian." Jes, sed por vivi la organizataj "buĉadoj" ne estas necesaj al la homspecio. Ĉiuj scias ke la batalantoj havigas profitojn nur al la instigantoj. La sorto de la batalintoj ne ŝanĝiĝas.

***

Jen opinio de militserv-rifuzinto, kontraŭnuklea juna amiko. Li atentigis min, ke li ne elstudis la problemon, do la sekvantaj vidpunktoj estas supraĵaj, tre partaj (eble partiecaj). Jenaj vidpunktoj estas pli teoriaj ol spertitaj.
"Filozofie, mi juĝas neperforton tute kontraŭnatura. La mondo, la naturo agas per rekta perforto (oni manĝas unu la alian por vivi). Starigi malsaman funkciadon estas neeble, stulte, kontraŭnature : ĉiam ni mortigu por vivi, eĉ nur planton.
Humane, tre riĉige estas strebi al alia rilatmaniero (almenaŭ provi). Ĉe la ekstremo tio havigas malpli da mortintoj ol la perforto (ho ve, nur la stultuloj postvivas). La Neperforto diferencigas la homon disde la animalo (pozitiva - negativa). Ĉar la homo elpensis la perforton pere de personoj kaj per intermetitaj maŝinoj, li sin pridemandas kaj provas transpasi tiun stadion (kiun la animalo ne atingis) per la neperforto.
Politike kaj konkretmaniere, la neperforto estas revolucia. (De post la komenco de la mondo oni uzis nur la perforton). Ĉiu alia luktorimedo estas revolucia ; la neperforto, kiu situas ĉe la ekstremaĵo, estas la plej revolucia. Per sia ekstrema flanko la neperforto estas ege interesa, ĝi malkaŝas multajn malbonaĵojn, ĝi reliefigas la limojn, la kazojn, la absurdaĵojn de la nuna regadsistemo (sed ĝi ne estas la nura teni tian rolon). Notu, ke neperforto ne signifas submetiĝon, pasivecon, obeeman akcepton, sed luktorimedon, armilon (teorie) absolutan, ĉiaokaze agemecon. Absoluta armilo : la neperfortulo rifuzas mortigi, sed konsentas morti por sia celaro.



Grandparte estas utopiaĵo revi senperfortan mondon ; sed en utopio kelkaj punktoj estus realigeblaj, limigitaj en lokoj kaj en la tempo. Sume, ili utilos al tiuj, kiuj ilin travivos, kaj tio estas la esenco. Laŭ mi, tio estas akvoguto kontraŭ oceano - kaj mi simpatias al la akvoguto...

Neperforto havas du ĉefajn kontraŭantojn : la perforton reggantan en institucioj dum jarcentoj, kaj la homan stultecon; ambaŭ estas kunligitaj al la timo, la kutimo.
La studoj pri neperforta defendo de iu lando (kiuj ekzistas en Francio, ekzemple), mirkonsternas min. La neperforto celu nur al tutmonda lampo."

Suzana.

**************************************************************

Maljunulo opinias : **L A   E S K I M O J**

Sur la tero estas regiono, kie vivas maldensa popolo, de ni nomita "ESKIMOJ".
Ili vivas de multaj jarmiloj, sen Dio kaj sen reĝo, sen majstro ordonanta tie iliajn vivkondiĉojn, sen mono, sen legitimaĵoj, sen gazeto, telefono, politiko, sen ministroj, sen deputitoj, sen tankoj, sen militaviadilo , sen gaso por sin varmigi aŭ kuiri siajn manĝaĵojn.
Mi estas certa, ke inter ili la plej granda nombro scias nek legi nek skribi la propran aŭ alian lingvon, aŭ eĉ la lingvon de iu plej "proksima" najbara grupo, kiu vivas tie, je pli ol milo da kilometroj... Ĉiuj tiuj grupoj nomas per diferencaj vortoj la objektojn de sia ĉiutaga vivo, ĉu tio estas fiŝo, filo aŭ filino, patro aŭ fremda homo alvenanta al ĉi tiu familia rondo.
Laŭ niaj vivkonceptoj, ĉi tiuj vivkondiĉoj estas tre malfacilaj, ĉar ni scias legi, skribi, telefoni, uzi gason, ni havas nomon por niaj ĉiutagaj aŭ imagitaj objektoj, veturas per aŭtomobiloj kaj klasas niajn ĉirkaŭulojn laŭ riĉuloj kaj malriĉuloj, laŭ laboristoj aŭ ekologiistoj, ktp... Ĉi tiuj Eskimoj bezonas nek gazetojn nek aliajn paperojn nek brakhorloĝojn nek fotilojn, nek reklamon por iu pli-malpli kosta televidilo aŭ lavmaŝino. Ili vivas tamen de jarmiloj.

Se mi persone volus vivi nun tiumaniere, sed kun uzado de nia nomita "teknika kulturo", sed sen legitimaĵoj, oni min enŝlosus

en karcero nomita "Hospitalo por frenezuloj" kaj forprenus de mi ĉiun homan rajton, kvazaŭ temus pri besto, profite de iu ruza "homo", kiu scias uzi niajn leĝojn...

Ĉu mi povus voki helpon de la Bestprotekta Asocio ?

-nn-

*************************************************************

## LAŬT EKOLOGIO

Nova verdikto pri Wyhl
**********************

La legintoj de la broŝuro "Katastrofplano pri la atomcentralo de Fessenheim - verdikto pri Wyhl" konas la argumentojn, pro kiuj en 1977 tribunalo de Freiburg/Breisgau malpermesis la konstruon de atomcentralo en Wyhl (Badio, FRG). Sed la 31an de marto 1982, tribunalo en Mannheim apelacie decidis permesi tiun konstruon. En la postaj tagoj manifestaciis pluraj dekmiloj da homoj. La lukto pludaŭras...

Manifestacio kontraŭ la ŝutadon de nukleaj rubaĵoj en la maron :
****************************************************************

En aŭgusto 1982 en la havenoj de Zeebruges (Belgio) kaj Don Helder (Nederlando) oni enŝipigos kaj poste ŝutos en Gaskonian Golfon radioaktivajn rubojn belgajn, nederlandajn kaj svisajn. Tiuj ruboj, lokitaj en metalaj bareloj kaj specialaj ujoj estos enakvigitaj 4000 metrojn profunde. Dum jarcentoj ili eligos radiadojn.

En raporto de 1980, O.C.D.E. asertis, ke estos neniu danĝero por la medio. Nu, multaj sciencaj studoj firme kontraŭdiris tiun aserton. Ĉirkaŭ tiu zono la faŭno kaj la maraj sedimentoj estos infektitaj. Por ke ĉesu tio, nacia manifestacio okazis la 29an de majo en Bruĝo (B). Pri tiu temo la Antinuklea Komitato Bordoza jam faris gravan laboron, kun multaj agadoj. Ĉar, plian fojon,



Britio kaj Belgio rekomencos la ŝutadon de radioaktivaj ruboj, ni ne restos pasivaj kaj pripensos por agado ĉi-somere. Estu pretaj, kaj se vi havas ideojn pri tio, ili estas bonvenaj.

Kion opinias Haroun TAZIEF pri la supergeneratoroj :
*************************************************

"Por "CREYS-MALVILLE", antaŭvidita por liveri 12 000 MW, la kosto superos 5 miliardojn da frankoj. Ĝi ne similos la aliajn centralojn, ĝi uzos ne uranion sed plutonion. Danĝerega estas tiu bruligaĵo kaj ankaŭ la malvarmiga fluidaĵo, natrio, kio trudos respekti multe pli severajn regulojn pri sekureco, ol por la PWR-centraloj. 89 petleteroj estis senditaj al la Ĝenerala Konsilio de Isère por la nuligo de tiu timiga projekto. Ankaŭ mi kaj Alain Bombard kaj J.Y. Cousteau sendis unu. Ĝi estos la unua tiuspeca atomcentralo kun tia potenco en la mondo. Laŭ la fakuloj la ekologiaj riskoj estas egaj..."

Ruĝa humuro aŭ nigra humuro ?
*****************************

La bienulo de Kastelo Siran en Labarde (Medoka regiono) havis bonegan ideon ! Li konstruigis kontraŭnuklean ŝirmejon por 55 000 personoj... ho ne, ne... 55 000 Medokvin-boteloj!
Nun la eventualaj postvivantoj de nuklea milito scios, kien sin turni por eltrovi la ŝategatajn botelojn. Ĉe la tombokela pordo, jen la epitafo : "Prefere ruĝulinoj ol mortintinoj!"
La majstro de tiu eterna kelo, S-ro Miailhe, tamen ne estas ekologia aktivulo. Nur singardemulo, tutsimple. Nia moderna Ali Baba, tiel protektama, vokis spertan profesoron pri radiprotektado de NATO-oficejoj. La celo de la vizito : konstati la taŭgan aranĝon de la alte ŝatata kelo kaj vidi kiajn efikojn povus estigi SS 20-raketo, alvenante sur la nuklean centralon de Braud-et-Saint-Louis. Kompreneble, tia ŝirmejo povas ŝirmi kelkajn personojn, sed la ĉefa celo estas "la Ruĝulinoj".

Komunikis Jacqueline kaj la E-grupo
de Eysines (Ĝirondio)

*************************************************************

Kune kun tiu iom ampleksa n-ro la abonantaro de "Laŭte!" trovos la "Adresaro"n 1982. Ĉiu bonvolu, se liŝi opinias tion pli oportuna - kaj certe tio estos pli oportuna! - faldi kaj tranĉi supre : rezultos belega A6-formata kajereto. Ha, oni ne haltigos la progreson ! Ankaŭ ĉiu laŭtulo bv. lude broŝuri.

Nia novelo :

## PAFU... PAFU...MORTIGU!

Estas la unua mondmilito. Tessaloniki-fronto en Greklando. La fronto iomete longe stabiliĝis, preskaŭ unu jaron. Ni, soldatoj, troviĝis sur la milita pozicio nomita "Nigra Pinto". Ŝtonigita montaro, senakva, frosta. Provizaĵo tre malfacile estis alsendita, kvankam ĝi estis abunda. Ĝin financis la franca milita komando.

Ĉiu soldato ricevis ĉiutage dek cigaredojn kaj unu litron da vino. Krom tio, por la gravaj manĝaĵoj - tag- kaj vespermanĝoj - abundan kuiritan manĝon kun deviga peco de viando, preskaŭ kvarono de kilogramo. Sed plej malbone estis kun la akvo : en la montara regiono estis neniaj akvofontoj, la akvo ne estis alportata per veturiloj aŭ muloj. Tiutempe en la franca armeo estis neniu kamiono aŭ benzina veturilo, sed nur muloj kiel plej forta kaj eltenpova rimedo por tirado. Nur de tempo al tempo, dum la pluvaj tagoj, la pluvaj gutoj formis provizoran rivereton, kies akvo verŝiĝis en ian ŝtonan krateron de kie nenien plu fluis. Tiun kavon kun akvo la soldatoj nomis simple "puto" kaj de tie ili la akvon uzis por lavado kaj trinkado. Iom post iom la akvo fariĝis malklara. Tamen la soldatoj uzis ĝin plue. Aperis malsanoj inter la soldatoj, speciale la abdomena tifo kaj la marĉa malario. Ili komencis tiel senkompate falĉi la soldatojn, ke la lazaretoj estis plenplenaj kun malsanuloj. Oni ekesploris tre zorge la kaŭzojn de tiuj tre gravaj malsaniĝoj kaj fine oni konkludis, ke ili devenas de la toksa akvo, kiun la soldatoj ĉerpadis kaj trinkis el la tiel nomata "puto". La komandanto de la dekoka infanteria regimento, oficiale nomata "Seka pino" pro sia tre kuraĝa heroaĵo dum la batalo sur montaro "Seka pino", la kolonelo, kiel la tagordonanto, malpermesis la uzadon de akvo el la "puto" por ĉiuj uzoj. Malgraŭ tiu ordono la soldatoj plu ĉerpis kaj uzadis. Aperis la mortaj kazoj. Necesis agadi pli draste, plej rigore. Estis pro tio eldonita tre severa ordono. Ĉiuj, kiuj uzas akvon el la puto,estos tuj sur la loko pafmortigitaj, pafekzekutitaj. Tiu ordono havis sian fundon en la leĝo pri la militista disciplino, kiu tekstas : Soldato, kiu dum milito ne plenumas la ordonojn, povas esti sen



aŭskultado kaj sen verdikto de urĝega tribunalo, de la superula estro ekzekutita pafmorte.

La soldatoj estis intermiksitaj, nome, malnovaj - t.n. maljunuloj - kaj tre junaj, - t.n. rekrutoj. La maljunaj soldatoj respektis laŭvorte la ordonon, kvankam pezakore ili eltenis la soifon, kiun oni povis kaj devis kvietigi per unu litro da vino, kiun ĉiu ricevis ĉiutage, sed foje neregule, pro la terenaj malfacilaĵoj. Sed rekrutoj ne. Ili laŭte protestis kaj diris, ke la tiel nomata "akva" situacio estas neeltenebla. Sed ordono estas ordono. Konata estas la intersoldata sentenco : "La ordonon oni ne povas blasfemi.". Aparte protestis unu rekruto kun kreola vizaĝo kaj blankaj sanaj dentoj, kun necigana brunhaŭtula fizionomio. La militkamaradoj nomis lin "senegalo" kaj diris moke, ke ne nur francoj havas siajn koloniajn trupojn, sed ankaŭ serboj. "Senegalo" kaŝe, dum la nokto, kiam la "puton" gardis neniu, portis en boteloj la akvon de la "puto". Tiel li havis sufiĉe da akvo por la lavado kaj la trinkado. Soldatoj sciis pri tio, sed neniu el ili volis lin denunci.

Ĉar la fronto estis longtempe stabiligita, la soldatoj havis subterejojn, en kiuj ili havis provizorajn, lignajn litojn kaj kie ili loĝis, kiam ne "deĵoris". Ofte, sed subite, tiuj lokoj estis vizititaj kaj inspektitaj pro diversaj kaŭzoj, speciale por kontroli, ĉu la soldatoj estas kun sia armilaro ĉiumomente pretaj. Tiun kontrolon faris ĉiam nur deĵoraj oficiroj kaj la soldatoj nomis ĝin simple "revuo". Iun matenon, tre frue, post la kvina horo, kiam la soldatoj apenaŭ ellitiĝis kaj sin vestis, venis en la subterejon la deĵora oficiro, leŭtenanto. Ke li vere estis deĵora, la soldatoj vidis, ĉar li havis skarpon ĉirkaŭ la talio kaj maldekstre revolveron, en la maldekstra mano sabron. Ekvidante lin, la ĉambrestro komandis "Atentu!". La oficiro donis al li per la mano la signon, ke li volas fari kontrolon. La ĉambra estro komandis : "Revuo". Ĉiuj soldatoj tuj ekstaris antaŭ siaj litoj, tute pretaj por kontrolo. Sur la vicon venis ankaŭ "Senegalo". Traserĉante lian ŝrankon, la oficiro subite eltiris du botelojn. Tenante ilin en la manoj, li direktis sin al la "Senegalo", demandis lin :

- Kion vi havas en la boteloj ?
- Akvon, sinjoro leŭtenanto, respondis trankvile "Senegalo".
- De kie vi havas tiun akvon ? - denove demandis la oficiro.
- El puto, sinjoro leŭtenanto.

- Vi scias, ke ni havas militan ordonon, kiu severe malpermesas uzadon de la akvo el la "puto", pro la abomena tifo kaj marĉa malario, sub la minaco de mortpuno sen verdikto kaj sen juĝado - akre respondis la leŭtenanto.
- Mi scias.
- Vi scias, sed vi tamen uzis kaj uzas, malgraŭ tio, ke vi ricevis vinon.
- Vino ne povas anstataŭi la akvon, mi havis ĉiam kaj ĉiam soifon, sinjoro leŭtenanto - milde respondis "Senegalo".
- Mi interrompas pluan diskutadon. Ordono estas ordono kaj al ĝi oni devas submetiĝi - kaj eltirante revolveron, li direktis ĝin sur la "Senegalo"n.

Ĉiuj ĉeestantaj soldatoj kun malfermitaj okuloj atendis la epilogon de tiu interparolo. "Senegalo" tute trankvile malbutonumis sian soldatan bluzon, montris sian bruston kaj kriegis :

- Pafu... Pafu... Mortigu... Mortigu...!

En la subterejo tomba silento... silentego. Oni povis aŭdi nur la zumadon de muŝoj. Subite, la leŭtenanto mallevis la revolveron kaj diris :

- Vi estas rekruto, juna homo. Mi ne volas vin mortigi. Mi vidas, ke vi estas kuraĝa kaj ke vi ne timas la morton, kaj tio estas la plej grava eco kaj virto de soldato. Ni bezonas tiajn soldatojn. Ili liberigos nian de naŭza, malamata malamiko kompatindan, subjugitan, okupitan landon...

D-ro Dragan Dimitrijeviĉ Russchitty

### N A S R U D I N

La majstro portis salon al bazaro sur azeno. La azeno trairis riveron, kaj la salo solviĝis. La majstro koleris, ĉar li perdis la salon. La azeno petolis, ĉar ĝi perdis la ŝarĝon.
Poste li portis lanon laŭ la sama vojo. La akvo de la rivero trempis la lanon, kaj la azeno ŝancele paŝis. "Ĉu vi supozis, ke ĉiam vi eskapos, trairante akvon?", la majstro mokis. Kris Long.



## L A N U B E T O kaj L A N E Ĝ O

La nubeto, kiu naskiĝis en bela sezono kaj konis pri vetero nur la belajn tagojn, iun matenon estis surprizita ekvidi tute griza la ĉielon kaj strangajn plumojn flirtantaj.

Li demandis sin, kio povas esti tiu stranga speco de pluvo, des pli ke ĝi falis tute malvarma sur lian nazpinton.

Tute nesciante de kie venis tiu aĵo, li petis klarigojn :

- Kio estas do tiu blanka pluvo, kiu ĉien falas? li demandis sian patron.
- Temas pri kuzoj niaj, kiuj venas de Gronlando kaj alportas al ni vojaĝmemoraĵojn.
- Ŝajne, li pensis, tiu rakonto de mia patro ne aspektas serioza.

Li iris do al sia avino por demandi ŝin pri la kialo de tia veterŝanĝiĝo.

- Tiuj blankaj flokoj, kiuj de la ĉielo venas al ni, mia karuleto, nu, estas ja la Granda Ursino kiu tro varmas kaj eltondas siajn harojn.
- Rakonto tiel nekredebla kiel la antaŭa, pensis la Nubeto. Mi bezonas alian klarigon.

Kaj li iris demandi sian patrinon, pri kio faligas tiujn plumetojn.

- En la paradizo la infanoj ne estas malpli petolemaj ol tiuj de la tero. Ili interbatalas per kapkusenoj kaj verŝajne ilin krevigis.
- Vere, ĉiuj tiuj plenkreskuloj havas neniun emon seriozi, pensis la Nubeto, seniluziigite.

Tiel li neniam eksciis kial, tuj kiam malvarmas, neĝo falas kaj vestas la teron per sia granda blanka mantelo.

J.P.Hennebois.

T R A   L A   M O N D O
per biciklo kaj esperanto
*************************

# NIA FELIETONO

La 25an de marto 1931.

Hieraŭ forlasis min miaj du kamaradoj el Hankoŭ. Mi feliĉas, ĉar mia restado naskis novajn "alvokiĝojn". Post dusemajnaj pluvegoj la temperaturo multe altiĝis. Varmas kiel dum someriĝo en Francio. La kampara aspekto rapide ŝanĝiĝis. La arboj floras. En la kotaj rizejoj, virinaj taĉmentoj en akvo ĝisgenue komencis la rizan prikladon sub suno senkompata.

Aprilo : Nova vizito al Sinjoro Konsulo. Lia opinio ne ŝanĝiĝis.

La 17an de julio 1931, foriro de Kantono al Hindoĉinio. Jam de la sesa kaj duono matene mia dormoĉambro plenas je miaj plej bonaj amikoj esperantistaj. Ili min akompanas ĝis la stacidomo, de kie mi forveturos, laŭirante la fervojon. Antaŭ nia disiĝo ni fotigas nin kaj adiaŭmanĝas kune. Mi foriras je la dekdua.

La 25an de julio, mi profitas ripozon ĉe usonaj pastroj de Jankon Na por revizii mian pakaĵon kaj mian biciklon. Du tagojn poste mi traveturas la landliman estuaron. La vetero fariĝis peza, minaca. Baldaŭ blovas tempesta vento. Mi suferas teruran marmalsanon. Feliĉe la ŝtormo kvietiĝas kaj la vojaĝo finiĝas kiel agrabla promeno en gondolo meze de koridoroj de verdaĵo kaj plaĝoj. Miaj kunpasaĝeroj afable mokas mian palan mienon. Kelkaj eĉ provas ekkonversacii... Post lasta enŝipiĝo en nuksoŝelon de ĉina pasigisto, jen mi en FORT BAYARD. Ĉe la unua domo, kiun mi renkontas, mi vidas kun emocio "OFICEJO PRI NAVIGADO" skribitan en la franca. De tri jaroj ili estas la unuaj vortoj, kiujn mi legas en tiu lingvo. Iom poste, nova agrablaĵo : bierglaso, kiun proponas al mi edzino de ŝtatoficisto. La lastan mi trinkis du jarojn pli frue en Krimeo.
Kiel ĉiam mi vizitas la Ĝeneralan Guberniestron loke rigardatan kiel komplezemulon. Tamen novan fojon mi konstatas la saman klasmalestimon, la saman zorgon protekti la francan prestiĝon. Mokridetе li do telefonas al konatino sia :



"Ha,lo, antaŭ mi 25-jarulo bicikle vojaĝanta ĉirkaŭ la mondo. Tio estas, ke jen lin portas lia biciklo, jen li portas sian biciklon. Bonvolu, mi petas, du-tritage lin gastigi. Sed petu neniun monon. Pagos mi." En tia malŝatema diferencigo kuŝas la tuta mizero monda.
Leĝa institucio : virina trafiko.
Suboficiroj vizitigas al mi najbaran urbon Ĉezan. La postan tagon ĉe unu el ili mi vidas junan kaj belan ĉininon, kiun la knabo estis rimarkinta. Tiuokaze mi ekscias, ke ekzistas nevortigita konsento inter la aŭtoritatoj kaj la prostituaj entreprenoj. Tio koncernas ĉefe la eŭropajn militistojn. Ili povas ankaŭ kontrakte edziĝi, kie laŭ ĉina kutimo ili aĉetas virinon por difinita tempo kaj sub certaj kondiĉoj. Kiam ili revenas al Francio, ili forlasas virinon kaj infanojn. Ĉar la militistaj instancoj postulas tre malfacilajn kondiĉojn por la foriro de la tuta familio, ĉefe koncerne la suboficirojn. Tiuj infanoj konsistigos la unuajn vjetnamajn batalionojn en la milito kontraŭ Francio. Ankaŭ iliaj patrinoj ludos gravan rolon dank'al sia trilingvismo, franca, anama kaj ĉina.

La 2an de aŭgusto mi forlasas Fort-Bayard al la misio de Pak Hoj, kie mi estas kore akceptita. Mi ekscias, ke la ĉinaj instancoj multigas la administraciajn malfacilaĵojn. Evidentas, ke ili intencas min elpuŝi.
Revene de mia vizito al la Konsulo : la bravaj pastroj estas konsternitaj ; oni petis, ke ili tuj min elpelu. Senhezite la Konsulo proponas al mi etan dormoĉambron en parkmeza ĝardendomo, mobilizante por tio ĉiujn siajn servistojn.
Mi konservas pri Sinjoro Konsulo kaj Sinjorino senmortan rememoron. Malgraŭ sia rango ili montris ĝentilecon, toleremon, simplecon dum la vespermanĝo surtabligita de la dommastrino mem. Ni parolas pri mia vojaĝo kaj esploras la mondan situacion. Niaj konkludoj ne estas optimismaj.

... Nun mi veturas en Tonkino. La regiono estas unu el la plej fekundaj en la mondo. Tamen la loĝantaro estas mizera, ankoraŭ pli ol la ĉina. Malgraŭ sia nehavo la ĉino fine min malestimis. Ĉi tie mi legas nur korpreman timon en la rigardoj. Eĉ la junularo estas frue eluzita de laboro kaj manko. La virinoj, ankaŭ la junaj, maĉas betlon. La maĉaĵo konsistas el betlofolio, peco el ia nukso kaj iom da kalko. Tiu maĉado laŭdire efikas desinfekte kaj sensoifige kaj misformas buŝon makulitan

de betloruĝa salivo. Alia eco de tiu popolo : kiel la ĉino, ĝi estas multe pli pruda ol la japano.

La 9an de aŭgusto, sub pluvego, mi alvenas en Hanoj per ponto DOUMER, laŭdire la plej longa en la mondo. Kelkajn tagojn poste, invitite ĉe franca vicsubleŭtenanto, mi devas respondi nekutimajn demandojn de unu el la gastoj. Li estas oficisto de la militista sekurservo. Li konfesas al mi, ke ĉiuj malliberejoj, civilaj kaj militistaj, superplenas. Iom pli poste mi ekscias, ke mi estas tre suspektinda al la militistoj. Eta enketado min konvinkas, ke la tuta malbono venas el la konfidencaj raportoj de Sinjoro Konsulo en Kantono.

La 24an de aŭgusto 1931 mi forlasas VINH, akompanate de du junaj skoltoj. Ni disiĝas ĉe pramo, kie mi konatiĝas kun S-ro Nguyen Tan Lin. Tiu renkonto havos feliĉajn neesperitajn sekvojn en Sajgono. De tiu pramo mi penetras en mizeregan regionon. Ŝtonoza grundo, senakva klimato. Sur la vojo senkompata mi renkontas vicojn da portistinoj provizantaj la vilaĝojn per maizo, kelkaj fruktoj, ligno, preskaŭ ne rizo. Ju pli suden mi iras, des pli da tiaj vivaj skeletoj mi renkontas. Sammomente greno putras en grandega silo. Jen kial mi estis kaj estas rifuzanto pri civilizacio nekapabla certigi la pluvivon de siaj kolonioj. Jen kial mi subtenas ĉiujn, kiuj luktas kontraŭ mizero korpa kaj anima. Pro tio mi persistas opinii, ke simpla, internacia lingvo estas unu el la iloj de la homa emancipiĝo. Tiurilate Esperanto montris sian kapablon, kaj se mia rakonto iomete kontribuis al tiu emancipiĝo, mia surtera vivo ne estis vana...

Militista taĉmento gastigas min por unu nokto. Mi ekscias, ke la malsatego kaŭzas timigan mortadon. Okazis ribelo. Sekvis drasta punhaltigo. El la 600 kaptitoj, 60 estis mortpafitaj. La plej certa rezulto de tiu metodo estas konservi malamon kaj naski venĝemon : Dien Bien Fu estis ties satigo.

(daŭrigota) Alfa-Beta

---

En venonta numero la fino de tiu nia felietono. Novlegantoj, kiuj volas eklegi pri la komenco, trovos aliajn ekstraktojn en la revuo "MONATO". Red.



mia sperto de kunvivado kun memmortigintinoj, mi vokus SAMU. Poste, se la amikino min riproĉus, mi dirus : "Ekskuzu, mi eraris, tuj kiam vi foriros de tiu malsanulejo vi povos rekomenci, kaj ĉifoje mi lasos vin trankvila."

Antaŭ ol fini pri la temo, ankoraŭ unu rimarko : kiam oni propravole decidis generi infanon, oni per tio mem sin devontigis zorgi pri ĝi, ĝis ĝi estos sufiĉe granda por sin mem vivteni (aŭ eventuale sin mortigi). Nu, la asekuraj kompanioj ne pagas en kazo de memmortigo, kio estas sufiĉe komprenebla. Do patr(in)o ne devus sin mortigi sen antaŭe zorgi, ke li aŭ ŝi ne lasos la kunul(in)on kaj la infano(j)n en mizero. Mi konsentas, ke Robert sin mortigu, kiel li ja rajtas laŭ la franca leĝaro, sed ĉu la pensio de orfo por lia filo ne estos financata per miaj impostoj ?

***

Eŭtanazio estas iom alia problemo ol memmortigo, ĉar, same kiel la kompatinda Polyeucte, kandidato al eŭtanazio devas trovi alian personon por lin aŭ ŝin mortigi. Nu, la leĝoj estas, ke :

- oni devas helpi al persono en danĝero. Ĝis nun la interpreto de tiu leĝo (artikolo 63a de la franca punleĝaro) estas, ke oni devas helpi personon riskantan morton. Oni povus argumenti, ke oni devas helpi per mortigo al persono minacata de granda sufero. Tio kontraŭdirus la jurisprudencon, sed ne la tekston mem de la artikolo 63a. Ĝi ja tekstas "persono en danĝero", kaj ne estas menciita, pri kia danĝero temas. Ĉu per suferiga medicina traktado oni devas helpi personon ne morti, aŭ ĉu per mortigo oni devas helpi personon ne suferegi ? Ambaŭ interpretoj povas akordiĝi kun la teksto.
- oni ne rajtas mortigi. La rajto de ĉiu persono al vivo estas parto de la internacie akceptitaj homrajtoj, kaj en Germanio la kontraŭuloj de aborto baziĝis sur ĝi por malpermesigi aborton kiel kontraŭkonstitucian agon. Sed rajto ne estas devo. Ekzemple, ke mi rajtas fondi familion ne signifas, ke mi ne same rajtas resti fraŭlino sen infano. Do la rajto vivi estas rajto, ne devo, kaj ne devus esti uzata kontraŭ kandidato al eŭtanazio. Restas do nur la franca leĝo malpermesanta mortigon. Nu, enkonduko de eŭta-

nazio en la franca leĝaron estus sufiĉe facila : sufiĉas nur aldoni artikolon al la listo de ekskuzoj pri memvola mortigo. Tiu listo jam ekzistas, ekzemple, oni rajtas mortigi por defendi sian aŭ alies vivon (laŭleĝa defendo). Iam edzo rajtis mortigi la amoranton de sia edzino, se lin li trovis en la geedza lito, kaj mi ne scias, ĉu tiu ekskuzo estas nun aboliciita. La aldono de eŭtanazio al la listo de la ekskuzoj ne devus esti pli malfacila, ol la voĉdono de tiu barbara rajto mortigi sian rivalon. Do jure la problemo estas facile solvebla.

Restas do nur la morala kaj religia vidpunkto. La katolika eklezio instruas, ke suferado de individuo partoprenas kune kun la suferado de Kristo kaj de la sanktuloj al la savado de la homaro, do suferanto devas oferi sian suferadon al Dio kaj plu suferi. Mi neniam sukcesis trovi en la Nova Testamento bazon por tiu instruo : kutime, en la evangelioj, kiam Jesuo renkontas suferanton, li ne konsilas al li oferi sian suferon al Dio, sed lin kuracas. Do, kvankam la ateista logiko ankoraŭ ne konvinkis min, ankaŭ la katolikan logikon mi foje malfacile sekvas... Laŭ mia propra kompreno, la Nova Testamento instruas, ke estas nur du absolutaj ordonoj de Dio : la amo al Dio kaj la amo al la proksimulo. Ĉiuj aliaj ordonoj, kiuj povus troviĝi en la Biblio, estas nur relativaj. Oni povas koncepti, ke kristana kuracisto, kiu mortigas suferanton, agas pro amo al tiu malsanulo, do ke lia ago estas prava, malgraŭ la ordono ne mortigi. Nu, tio estas nur mia propra interpreto, kaj plej ofte miaj interpretoj de la Nova Testamento ne akordeblas kun tiuj de la katolika eklezio. La lastan fojon, kiam mi provis diskuti kun katolikino, ŝi konkludis, ke mi estas anarkista, sed mi ne scias, ĉu ŝi pravis. Verŝajne, se oni proponos enkonduki en la punleĝaron la ekskuzon de eŭtanazio, la katolika eklezio kampanjos kontraŭ la leĝpropono, same kiel ĝi kampanjis kontraŭ la aborto. Sed oni ne devas troigi la forton de la katolika eklezio en Francio : la leĝo pri aborto ja estis voĉdonita (de la dekstro) kontraŭ ĝia opinio, do kial ne ankaŭ la leĝo pri eŭtanazio ?

El racia vidpunkto, mi pensas, ke homo rajtas morti.



La ideo, ke oni devas vivi plejeble longe, estas ideo okcidenta. En Japanio, ekzemple, oni ne havas tiun koncepton, kaj memmortigo estas multe pli bone akceptita de la publika opinio, ol en Francio. Laŭ mi, kio gravas, ne estas la longeco de la vivo, sed kion oni faras dum tiu tempo. Se estas antaŭvidebla nur longa suferado, oni devus havi la rajton tuj morti, ĉar ĉiukaze oni iam mortos, do ĉio, kion oni povas gajni, estas kelka tempo, dum kiu oni suferos.

Sed eŭtanazio metas, kiel memmortigo, la problemon de la libereco de la individuo. Kiamezure niaj decidoj estas la produkto de nia racio, kaj kiamezure de nekonsciaj faktoroj? Por ke la decido morti estu libera, necesas :

- ke la suferanto estu plene konscia. Ĉu homo kuŝanta sur malsanuleja lito, kiu suferas, kaj kies malsano estas nekuracebla, reale havas plenan liberecon pri siaj decidoj?
- ke la suferanto estu plene informita de la kuracistoj pri sia malsano : ĉu ĝi estas kuracebla, kiajn suferojn oni povas atendi, ktp. Nu, medicino ne estas ekzakta scienco, kaj eĉ la plej granda specialisto ne povas esti 100 % certa, ke malsano estas nekuracebla.

Do plena konscio de la malsanulo kaj kompleta informo pri lia kazo ŝajnas al mi necesaj, por ke lia decido estu valida. Krome, necesus respekti la konsciencon de la kuracisto. Mi scias, ke la respekto de la konscienco de la kuracistoj metis grandajn problemojn pri aborto, sed ŝajnas al mi, ke la principo, ke homo rajtas ne agi kontraŭ sia konscienco, ne povas escepti la kuracistojn. Do, se malsanulo, post kompleta informo pri sia kazo, libere deziras morti, necesos trovi la kuraciston, kiu akceptos lin mortigi. Tiuj ŝajnas al mi la tri kondiĉoj, kiujn devus antaŭvidi leĝpropono pri enkonduko de eŭtanazio.

Mi ne komprenas la aserton de Kribo, ke foje kuracistoj intervenis pro peto de la familio por mortigi suferantojn. Normale, por suferi, necesas esti konscia. Se la malsanulo estas konscia, kial oni demandas la familion, kaj ne lin mem ?

Laŭ mi, eŭtanazio decidebla de aliaj personoj ol la mortonto mem metas multajn problemojn. La familianoj de la malsanulo

estas ankaŭ liaj heredontoj, kaj eventuale la ricevontoj de lia vivasekuro. Dum longa tempo, asekuro pri vivo estis malpermesata en Francio, ĉar oni trovis danĝera, ke alia persono havu financan intereson pri la morto de iu. La sama problemo metiĝas pri eŭtanazio decidebla de la familio. Se avo kuŝas en komato, se laŭ la kuracistoj li neniam vekiĝos, sed povos resti tiel dum 20 jaroj, tio signifas, ke dum 20 jaroj la nepoj atendos la heredon (fakte mi pensas, ke oni devus abolicii heredon, ĉar estas maljuste, ke filo de riĉulo bezonas nur naskiĝi por mem esti riĉa. Sed tio supozigas tutan ŝanĝon de la socio, kiu estas ekster la kadro de ĉi tiu debato.) Nu, ĉar medicino ne estas ekzakta scienco, povus okazi, ekzemple pro progreso de la medicino dum tiuj 20 jaroj, ke kontraŭ ĉiuj probabloj la avo tamen revekiĝus kaj ŝanĝus sian testamenton. Okazis en Usono, ke la gepatroj de junulino en komato petis, ke oni ĉesu ŝin vivigi artefare. Nu, post tiu ĉeso la junulino plu vivis, kontraŭ ĉia atendo. Ĉar medicino ne estas ekzakta scienco, la riskon de eraro devas akcepti nur la koncernato. Do mi konsentas, ke post kompleta informado pri sia kazo, malsanulo rajtu peti morton, sed mi malaprobas eŭtanazion decideblan de alia persono, eĉ kuracisto.

Resume, mi opinias, ke estas racie, ke oni permesu eŭtanazion, se :
- la malsanulo estas en tia stato, ke lia decido povas esti konsiderata plene konscia ;
- la malsanulo estas korekte informita pri sia malsano ;
- troviĝas kuracisto (aŭ eventuale flegisto), kiu akceptas lin mortigi.

La leĝo pri vivasekuro devus esti ŝanĝita, por ke la familio tamen ricevu la monon, se estas pruvite, ke la decido morti rezultis el nekuracebla malsano, kiun la koncernato ne konis dum la tempo, kiam li subskribis la asekuran kontrakton (kutime maljunuloj kaj gravaj malsanuloj estas tutsimple malakceptataj de la asekuraj kompanioj. Krome, la familio ricevas nenion, se la morto estas konsekvenco de atomakcidento) (zorge relegu vian kontrakton!). Sed, ĉar kutime la konduto de homoj tute ne estas racia, mi antaŭvidas, ke tia leĝo metus multajn problemojn en la praktiko.

Jakelino.



## VIVO DE "LAŬTE!"

* La multobligado :

La Rubikonon ni transiris, komence nur iomete kaj kun iom malsekaj piedoj... La unuaj paĝoj de tiu ĉi n-ro plus la broŝurserva folio trovebla en la Adresaro estas ofsete multobligitaj. La cetero estas mimeografita. La ofsetprovo reliefigas - se tiel diri! - mankojn. Ĉefe inkmankon, malsupre de p.2 kaj 4 kaj lastpaĝe de la BS-katalogeto. Ĉar la difekto rimarkeblas ĉiam samloke de ĉiu folio, la rimedo estos facile trovebla, venontokaze. Unu el la avantaĝoj de ofsetado estas la pli neta aspekto - kiam inko ne mankas - ĉefe de titoloj kaj desegnoj. La ofsetplakoj kostas pli ol stenciloj kaj estas multe pli facile fuŝeblaj, kiam mankas sperto. Sed entute la provo ne estis malkuraĝiga.

* Redaktomaterialo :

Spite la ŝvitadon de la multobliganto kaj la angoreton de la kasoprizorganto, la redaktanto de "Laŭte!" estas feliĉa homo. La artikolaro estas abunda, varia kaj eĉ interesa. Kompreneble, ĉi-lasta vidpunkto estas iom pli subjektiva. Dankon al ĉiuj, kaj aparte al la ĉenleterularo ! (La venontaj debatoj temos pri "Naciismo" kaj poste : "Kiel vivantigi E-gazeton?")

* Per ofsetado eblas aperigi ilustraĵojn en pli bonaj kondiĉoj(*) Sed ni ricevas malmulte da netaj, facile preseblaj desegnaĵoj. La frontpaĝan ni "pruntis" ; ĝi estas disponebla sur pacista poŝtkarto mendebla (franclingve) al BREVARD, BP 2, Machilly F 74140 DOUVAINE. La Kastelnova Grupo ve aperigas sian lastan aventuron. La grupestro,post sia akcidento, rezignas. Esp-o estas vere tro danĝera lingvo...

* Abonprezo :

Ĉiuj eldon- kaj sendkostoj senĉese plialtiĝas. La abonprezon de "Laŭte!" vole-nevole ni devas "adapti". Ekde nun validas por ĉiuj landoj, inkluzive Francion, jena abonprezo : 18 FF.

* Abonnombro :

La ĉi-jara (preskaŭ definitiva) statistiko : 328 abonoj (76 novaj adresoj) kun 25 % eksterfrancie. Pasintjare : 288 abonoj kun nur 19% eksterfrancie. Ni plu bonvenigas legantojn/kunlaborantojn el la tuta mondo !

(*)Sur p.47 bedaŭrinde la represado de la vortoj estas fuŝita!

ĴUS APERIS kaj ni ĵus ricevis - tial mankas tempo por detale kaj inde recenzi tiun valoregan verkon :

"N U D P I E D A G E N" de NAKAZAWA Keizi, trad. el la japana de IZUMI Yukio, eldonita de Rondo Gen, 288 paĝoj en A5-formato.

Jen la plej ampleksa bildstria libro en Esperanto ! Bela eldonaĵo. Netaj, sobraj, korŝiraj desegnoj. Aŭtobiografio de japano travivinta la finon de la dua mondmilito kaj la atombombadon en Hiroŝimo. Ĝi estas furora libro kontraŭmilita kaj kontraŭnuklea en Japanio. Nun aperas la unua (el 7 volumoj) en Esp-o. Ĉiu e-isto nepre posedu kaj diskonigu tiun verkon! Prezo : 27 gld. + sendkostoj. Eblas mendi al UEA, al Japana Esperanto-Instituto, al Kansai-Ligo de E-Grupoj, ktp...(Kiu libroservo ne konsentus ĝin disvendi?)

Ni represas jenajn vortojn el la antaŭparolo kaj ĉi-apude la lastan paĝon :

"...La desegnoj kiuj sekvos estas sufiĉe ŝokaj, precipe tiuj en la lastaj paĝoj. Jen viktimoj marŝas kvazaŭ fantomoj kun brulvundoj tutkorpe - kies haŭtoj dekarniĝis kaj pendis ĉifone pro la momenta temperaturo pro radioj de du mil gradoj celsie. Suferinte la eksplodan blovon apud fenestro, knabino ricevis vitrerojn sur la tuta vizaĝo... La kruelo de la atombombo mutigas nin..."

## L A A R G I L A S E R V I S T O
(hinda apologo)

Iu saĝulo ricevis de la dioj la povon fabriki al si servistojn el argilo. Tiuj kreskis pli kaj pli, sed kiam la saĝulo skribis sur ilian frunton la vorton MORTO, ili disfalis en polvon. Tion faris la saĝulo, kiam iu argila homo atingis lian altecon, por eviti, ke li fariĝas tro granda kaj pli forta ol li. Kaj tiam li faris al si novajn servistojn el argilo. Sed iam la saĝulo forgesis skribi la vorton MORTO sur la frunton de iu servisto, kiu jam superis lin je alteco kaj forto. Kiam li konsciis pri tiu forgeso, estis jam tro malfrue, ĉar lia mano ne povis atingi la frunton de la servisto. Kaj nun la argila homo mortigis lin!...

Daniel LUEZ.






La lasta paĝo de "NUNPIEDA GEN"

* La venonta numero - certe pli maldika! - aperos komence de septembro. Ĝi entenos alian gravan kontribuon al la debato pri "Eŭtanazio" kaj la kutimajn rubrikojn.

# SAT-BROŜURSERVO

* Denove disponeblaj broŝuroj :

- "Esperanto su 24 pagine" por itallingvanoj. Ni iam ricevis de itala amiko ĝeneralan kritikon pri tiu varbilo kompilita de Maŭro de Sassi laŭ la bone akceptataj " Espéranto de poche" kaj "Esp. en 24 pâginas" (jam eldonitaj je resp. 6250 kaj 3440 ekzempleroj!). Ni petis pli konkretajn sugestojn por modernigi la enhavon, sed, ilin ne ricevinte, ni ĵus reeldonis sen ŝanĝoj "Esp. su 24 pagine" (pli taŭga titolo devus esti "L'Esperanto in 24 pagine"). 28 paĝoj, 2FF. (10 ekzempleroj kontraŭ 20 FF kun afranko).
- "La Bazoj de Anarkiismo", kun plifortikigita frontpaĝo. 12 FF.
- "Al la Junuloj + Biografio" de Kropotkin. AJ.8FF.

* Novaĵoj :

- "La Individualisma Socialismo de D-ro Axel Robertson Proschowsky" (vidu la recenzon p.24). IN. 2FF
- "Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovetio?" de LANTI/IVON. ofsete represita, ĈS. 6 FF. Lanti respondis tiun demandon jam komence de la jaroj '30... Dume, oni plu "konstruadas" en Sovetio, kaj ankaŭ aliloke nun, sed la analizo de LANTI kaj IVON restas leginda, eĉ de nesamopiniantoj.

* Por la venontaj monatoj la eldonprogramo entenas :
- La libereco (kompilaĵo de pensoj de BAKUNIN) tr.D.C.
- La Turo de l'Popoloj (HAN RINER, tr. Valo)
- Naciismo (Lanti)

---

Gérant & Imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque. CPPAPn°58651